Bulletin d'information bilingue sur l'espéranto *** Dulingva informbulteno pri Esperanto

N° 192
octobre
novembre
décembre
2020

# LA INFORMILO

N° 192
oktobro
novembro
decembro
2020

l'espéranto
la langue de l'amitié
sans frontières

ESPERANTO 2020
Justa komunikado

esperanto estas mojosa!

espéranto France-Est


**ESPERANTO FRANCE-EST**
============
association culturelle
pour la promotion
de la langue
internationale
**ESPERANTO**
regroupant
les départements
**Bas-Rhin (67)**
**Haut-Rhin (68)**
**Meurthe-et-Moselle (54)**
**Meuse (55)**
**Moselle (57)**
**Vosges (88)**
Maison des Jeunes
et de la Culture
"Philippe Desforges "
27, rue de la République
**FR-54000 NANCY**
============
**ABONNEMENT / ABONO**
**Papera versio: 18 €**
**Reta abono: 7,50 €**

## La littérature espérantophone n'existerait-elle pas???

Dans le numéro 563 de la revue LA RECHERCHE, Barbara CASSIN, philosophe et philologue, médaille d'or du CNRS, déclare: "L'espéranto n'a rien d'universel, il est fabriqué à partir de racines et de syntagmes essentiellement européens et si une langue se définit par des auteurs et des œuvres, quelles sont les œuvres originales en espéranto?"

Madame Cassin fait donc partie de ces scientifiques (?) qui affirment sans avoir vérifié. A-t-elle simplement pris la peine d'entrer en contact avec une association d'espéranto? Peut-on imaginer Claude Lévy-Strauss parler des peuplades d'Amazonie sans s'être rendu sur place pour étudier leurs langues et leurs traditions?

Nous appelons nos lecteurs à diffuser cette première page de notre revue chez leurs amis non espérantophones.




Librairie au siège de l'association mondiale d'espéranto

On recense aujourd'hui plus de 30 000 ouvrages en espéranto, originaux ou traductions. Ils sont essentiellement disponibles auprès de librairies gérées par le mouvement espérantophone. L'une des plus importantes est le libro-servo de l'association mondiale d'espéranto qui compte plus de 6000 références. La littérature espérantophone est également disponible au LIBROSERVO d'Espéranto France-Est.

L'esperanta PEN-Centro a été admis en 1993 au sein du PEN-Club International (Poètes, Ecrivains, Nouvellistes), la seule organisation d'écrivains admise au sein de l'UNESCO. Elle propose des candidatures de ses membres au Prix Nobel de Littérature.

# Virtualaj kunvenoj kaj prelegoj de la






## Londona Esperanto-Klubo .

https://www.youtube.com/channel/UCiN6RS-t5RDEKZy2ThCNnDg/videos .

La Londona Esperanto-Klubo organizas ĉiu-vendrede vespere ekde la 20a horo (laŭ franca horo) virtualan kunvenon. Plej ofte kunlaboras la Antverpena Klubo.
Renato Corsetti regule informas interesatojn pri zoom-kodoj kaj pasvorto.
La kunveno komenciĝas per prelego, kiu plej ofte daŭras proksimume unu horon. Post serio da demandoj kaj respondoj sekvas diskutoj kaj babiladoj.
La nombro da gastoj ofte superas 50 personojn, kiuj povas interveni por demandi aŭ komenti.





## Londona Esperanto-Klubo .

Jen la prelegoj aŭskulteblaj ĉe jutub-kanaloj

En la retejo de Espéranto-France Est: http://esperanto.france.est.free.fr/
ĉe la rubriko Prelegoj de la Londona Klubo aŭ per jena ligo:
https://www.youtube.com/channel/UCiN6RS-t5RDEKZy2ThCNnDg/videos
Eblas aŭskulti la ĉi-subajn prelegojn. Ni deziras al vi agrablan aŭskultadon.

| | | |
|---|---|---|
| 4a de decembro 2020 | Prelego de Ite Tytgat | Virusoj, vakcinoj, imuneco |
| 27a de novembro 2020 | Prelego de Bernard-Régis Larue | La lunoj de Jupitero |
| 20a de novembro 2020 | Kial kaj kiel mi fariĝis esperantisto | |
| 6a de novembro 2020 | Prelego de John Wells | Lingvo seminario: prononco |
| 16a de oktobro 2020 | Prelego de Charlotte | TEJO La junulara Esperanto-movado |
| 2a de oktobro 2020 | Prelego de Ahmad Mamduhl | Ni bonas kaj povas |
| 4a de septembro 2020 | Prelego de John Wells | Lingva seminario |
| 28a de aŭgusto 2020 | Prelego de Trevor Steel | Ĉu paŭlismo aŭ kristanismo? |
| 21a de aŭgusto 2020 | Prelego de Giridhar Rao | La lerneja sistemo de Barato |
| 14a de aŭgusto 2020 | Prelego de Bruce Sherwood | Ĉu la tero estas plata? |
| 7a de aŭgusto 2020 | Prelego de John Wells | Lingva seminario |
| 31a de julio 2020 | Prelego de Anna Lowenstein | Vizito al Kenwood-domo |
| 24a de julio 2020 | Prelego de Orlando Raola | Unu-lingvulo, du-lingvulo, tri-lingvulo. Vivi sin esprimi kaj verki |
| 10a de julio 2020 | Prelego de John Wells | Lingva seminario |
| 19a de julio 2020 | Prelego de John Wells | Lingva seminario |
| 12a de junio 2020 | Prelego de Ite Tytgat | Detekti la viruson |
| 5a de junio 2020 | Prelego de Trevor Steel | La libro "kvazaŭ ĉio dependas de mi" |












16a de oktobro 2020 Prelego de Charlotte
TEJO la junulara Esperanto-movado






28a de aŭgusto 2020 Prelego de Trevor Steel
Ĉu paŭlismo aŭ kristanismo?



2a de oktobro 2020 Prelego de Ahmad Mamduhl
Ni bonas kaj povas






14a de aŭgusto 2020 Prelego de Bruce Sherwood Ĉu la tero estas plata?









31a de julio 2020 Prelego de Anna Lowenstein Vizito al Kenwood-domo





Infekto Covid 19


ŜLOSILO kiu serĉas SERURON

1. Viruso envenas la korpon: pere de salivo en la regiono de nazo, buŝo, gorĝo kaj okuloj.
2. Ĝi supozeble eniras la korpon tra la **mukozaj membranoj**, ĉefe la nazan kaj laringan mukozon kaj eniras la korpon tra la spira vojo.
3. Per la spikoj ili alkroĉiĝas al homaj ĉeloj de tiuj regiono.
4. La homaj ĉeloj de tiuj regionoj portas specifan seruron (receptoroj). La **5 proteinoj** de SARS-CoV-2 inter-agas kun **ACE2** (Angiotensin-konvertanta enzimo 2).
5. Post ligo la viruso estas enigita en la ĉelon.



12a de junio 2020 Prelego de Ite Tytgat Detekti la viruson












29a de majo 2020 Prelego de Marc Bavant Bazaj faktoj pri la Elama



# Vojaĝado en Ĉinio




En Ĉinio la trajnoj estas tre bonaj transportrimedoj por vojaĝi: praktikaj, rapidaj, akurataj, puraj, komfortaj, modernaj, kaj ne tro kostaj. La fervoj-reto, kiu longas je 130 000 km, estas unu el la plej vastaj en la mondo. La trajnoj veturas en ĉiuj provincoj, eĉ ĝis la insulo Hajnano en Suda Ĉinio kaj Lasao en Tibeto.




Ankaŭ eblas atingi Ĉinion per internaciaj trajnoj:

- de Parizo al Moskvo https://www.russiantrain.com - de Moskvo al Pekino (tra Manĉurio aŭ Mongolio):

https://www.travelchinaguide.com https://www.russiantrain.com - de Ulanbataro al Pekino - de Pjongjango al Pekino - de Hanojo al Pekino, - de Almato al Urumĉio - de Honkongo (Hung Hom) al Kantono, Ŝanhajo kaj Pekino.

Mi tre plezure trajn-vojaĝas en Ĉinio ĉar estas momentoj por malkovri la ĉinan popolon, kiam la homoj estas malstreĉaj kaj disponeblaj por aliaj homoj! Ankaŭ la pejzaĝoj ĉirkaŭ la trakoj estas tre belaj kaj variaj en la kamparo kaj montaro.

Ĝenerale la stacidomoj situas proksime de la urbocentroj.

Busoj, metrooj kaj taksioj atingas ilin.

Pli bone, se vi 10 tagojn antaŭe aĉetas bileton kaj rezervas lokon en la dezirata trajno, ĉar multaj homoj vojaĝas en Ĉinio. Preferinde ne vojaĝu per trajnoj okaze de la printempa festo, ĉar ili estas plenplenaj. Se vi volas vojaĝi en tiu sezono, rezervu unu monaton antaŭe. Eblas aĉeti bileton en stacidomo kaj urbo-giĉetoj aŭ per interreto, sed iom pli koste:

https://www.ctrip.com (en 17 lingvoj!). Vi devas montri vian pasporton al la bilet-vendisto, ĉar oni notas vian nomon kaj numeron de la pasporto sur la bileton.



En grandaj urboj mi konsilas al vi ĉiam alveni kun viaj aĉetita bileto kaj pasporto, ĉe la enirejo de la stacidomo, minimume 30 minutojn antaŭ la ekiro de la trajno, ĉar oni devas en iom longa vico trapasi kontrolojn de biletoj kaj de bagaĝoj en laser-tunela skanilo. Poste eblas aĉeti iom da manĝaĵoj kaj trinkaĵoj en butikoj ene de la stacidomo. La trajn-horaro aperas sur granda tabulo kun la numero de la trajno, horo kaj trako kun la destinloko en ĉina skribaĵo. Vi trovas la trajn-numeron kaj horon sur la bileto. La pasaĝeroj atendas en granda atendejo proksime de kiu troviĝas necesejo kaj akvo-varmigilo kun krano por preni iom da varma akvo por teo aŭ nudeloj. Kiam la trajno alproksimiĝas, fervojistoj malfermas elir-pordojn kaj kontrolas biletojn por iri al la kajo. Ĉe la pordo de la pasaĝer-vagono konduktoro ankaŭ kontrolas la biletojn kaj montras, kie estas via kuŝ-loko aŭ sidloko. En longa trajno laboras ĉirkaŭ 50 fervojistoj por via komforto,

konduktoroj, kiuj zorgas pri pureco de la vagonoj kaj vekas la pasaĝerojn antaŭ la alveno, kuiristoj en restoracia vagono kaj riparistoj de la diversaj ekipaĵoj.



Por ŝpari nokton en hotelo, eblas uzi noktajn trajnojn, kiuj veturas sur mezlongaj kaj longaj distancoj en la tuta lando. Tiuj trajnoj (kategorioj T, K kaj L) havas kuŝ-vagonojn kun litetoj ekipitaj per lito-tukoj, kovriloj kaj kap-kusenoj. Oni ŝanĝas la tukojn post uzado. En la malmola klaso estas 6 litetoj en kupeoj sen pordo sed kelkfoje ekipitaj per kurtenoj inter la koridoro kaj la kuŝlokoj. La mola klaso estas pli luksa kaj komforta kun 4 litetoj en ĉiu kupeo kaj pordo, kiun la pasaĝeroj povas ŝlosi.

En la kuŝ-vagonoj ĉiuj kupeoj de ambaŭ klasoj estas ekipitaj per termoso, kiun oni povas plenigi per tre varma akvo disponebla ĉe krano en ekstremaĵo de la koridoro. Tiu akvo necesas por prepari teon kaj nudelojn. Necesejo kaj manlavujo ankaŭ situas ĉe ekstremaĵo de la vagono. En malmola klaso estas ankaŭ pasaĝer-vagonoj kun nur sidlokoj, sed tio estas malkomforta se oni veturas dum longa tempo. Komence de via vojaĝo la konduktoro en kuŝ-vagono prenas vian bileton kaj donas al vi plastan karton. Kiam la trajno proksimiĝas al la stacidomo, kie vi elvagoniĝos, la konduktoro vekas vin kaj redonas al vi la bileton. Atentu ne perdi ĝin, ĉar kiam vi eliras el la stacidomo, oni kontrolas vian bileton.



Mi konsilas al vi kunporti manĝaĵon kaj trinkaĵon por longa vojaĝo. Eblas ankaŭ aĉeti ilin ĉe la koridoro de la vagono, kiam servisto puŝas ĉareton.

La trajnoj ankaŭ havas restoraci-vagonon, en kiu vi povas manĝi pli lukse sed ne tro koste.

La fulmrapidegaj trajnoj (kategorioj C, D, G kaj Z kun kuŝvagonoj) veturas ĉirkaŭ 200-300 km hore inter pli ol cent urboj sur speciala fervoj-reto 22 000 kilometrojn longa, la plej longa en la tuta mondo! Tiuj trajnoj estas tre komfortaj.

Graciaj kaj afablaj stevardinoj servas la pasaĝerojn. Vi povas ĉe ili aĉeti trinkaĵojn kaj manĝaĵojn. La trajnoj enhavas tri klasojn: unua klaso, dua klaso kaj la luksa klaso "Business". Kompreneble necesejo kaj klimatizado troviĝas en ĉiuj vagonoj.

Mi mem preferas vojaĝi per nerapidaj noktaj trajnoj (kategorioj T, K kaj L) ĉar laŭ mi, ili estas sufiĉe rapidaj, komfortaj kaj ne tro kostaj kompare al aviadilo, kiuj multe pli poluas la aeron. Mi estas emerito kaj havas tempon por vojaĝi sen tro damaĝi nian vivmedion.

Prezoj de biletoj :

Ekzemplo de Pekino al Kantono 2 475 km, rapidegaj trajnoj ĉirkaŭ 8h, nerapidaj trajnoj 21h.

Fulmrapidega trajno 2a klaso = 862 CNY; 1a klaso = 1 380 CNY ; klaso luksa "Business" = 2 724 CNY
Kuŝvagono malmola klaso = 456 CNY ; mola klaso =784 CNY Sidloko malmola = 251 CNY ;
sen sidloko = 251 CNY 1 EUR = 7,77 CNY

Bonan vojaĝon !
Henry Bruno, 24/08/2020

Trajnhoraroj kaj informoj:
https://www.chinahighlights.com/china-trains/
http://www.china-train-ticket.com
https://www.travelchinaguide.com/china-trains
https://www.ctrip.com www.seat61.com
https://www.russiantrain.com

# *“Senutila haltejo”*



### LA JAPANA HALTEJO KONSTRUITA POR MEMORIGI NIN PRI LA GRAVECO HALTI

En la prefekto-distrikto de Yamaguchi, en suda Japanio, ekzistas malgranda haltejo, kiun multaj konsiderus absolute senutila.

Ĝi estas sur fervoja linio, kiu trapasas la preskaŭ senmakulan naturon: de unu flanko la densa vegetaĵaro, de la alia rivero. Ne estas vilaĝoj aŭ urboj en la proksimeco, ne estas turismaj lokoj, estas “nenio” krom la naturo.

Ĝi estas neloĝata loko, pro tio ĝi estas la lasta loko por konstrui fervojan haltejon.

Sed la japanoj decidis konstrui unu ĝuste tie, meze de nenie.

Ĝi nomiĝas “Seiryu Miha-rashi Eki” kaj unuavide, ĝi povus provoki rideton: Ĝi ne estas atingebla piede kaj de la kajo vi eĉ ne povas eliri. Ne estas ŝtupoj, ne estas benkoj: vi nur povas stari tie. Malgranda betona rekt-angulo, kiu rigardas la riveron Nishiki kaj estas tute ĉirkaŭita de verdaĵo.

Al kio utilas ĉi tiu “senutila” haltejo? Fari ion, kion ni tute ĉesis fari, konsiderante ĝin senutila kaj enuiga agado, tempoperdo: halti.

Pli ol trajn-haltejo, ĝi estus difinita kiel posteno de observado atingebla nur se vi trafas trajnon. Vi ne povas alveni per aŭto (la sola vojo estas trans la rivero) kaj vi ne povas foriri, piede, do la sola maniero forlasi la haltejon post alveno estas atendi la sekvan trajnon.

Ĝi estas haltejo kiu ne havas iun ajn celon, almenaŭ se ni rezonas laŭ kutima cinika maniero. Malfermante viajn horizontojn, vi tamen povas senti la magion de speciala loko, kiel ĉi tiu, kaj tiuj, kiuj sukcesas nuligi la pasintecon kaj la estontecon kaj enmeti sin komplete en “ĉi tie kaj nuno”.

Kiu alvenas al la haltejo “Seiryu Miharashi Eki”, faras tion nur por halti.

Ne nur en la fizika senco, sed ankaŭ kaj ĉefe de la mensa vidpunkto.

Decidi eltrajniĝi en ĉi tiu haltejo signifas ribeli kontraŭ la frenezaĵo de la ĉiutaga vivo, la infera rutino kaj la ĉiuspeca polucio, kiujn ni enirigas en nian menson.



Eltrajniĝu, kaj kion vi faras? Nenion praktike kaj konkrete.

La beleco halti.

Vi nur observas la mondon, tiun pecon de la mondo. Spektu la akvon, kiu fluas laŭ la rivero. Vi ĝuas la silenton post la foriro de la trajno. Observu la densan vegetaĵaron. Vi prenas vian tempon por pigrumi, aŭ pli bone por “nenion” fari. Vi trovas internan pacon, vi trankviliĝas, vi malstreĉiĝas.

Pripensu, se vi ŝatas. Aŭ provu plene vivi en “ĉi tie kaj nune”: sentu ĉion ĉirkaŭ vi, mergiĝi komplete en la nuna momento. Foje necesas eliri el la hamstra rado, en kiu multaj el ni vivas ĉiutage.

Tiu aro de respondecoj kaj kutimoj, kiuj kurigas vin,

kuri, kuri sen moviĝi metron, kie ĝi vere gravas: interne, en la mirinda mondo de introspekto, sed ankaŭ ekstere, en la interago kun aliaj homoj, en la realigo de propraj idealoj kaj en la observado de la mirindaĵoj de la mondo.

Ĉiuj landoj devas havi haltejon kiel ĝi, (kaj eble ili havas senkonscie), kie ili povos eltrajniĝi por fari “nenion” krom aŭskulti unu la alian, ĉirkaŭrigardi kaj doni iom da paco al sia menso kaj koro.



Traduko de Vito Tornillo El blogo de Gianluca Gotto: Manĝu, Vivu, Vojaĝu




# ESPERANTO en BENINO

Lerno jaro 2020-2021: Disdonado de lernejaĵoj al geinfanoj en Benino.

Afrika Centro Mondcivitana ne nur respondecas pri la instruado de Esperanto sed ankaŭ pri subtenado de geinfanoj, kiuj ne kapablas lernejiĝi pro manko de familiaj rimedoj aŭ estas orfoj. Antaŭ pluraj jaroj Afrika Centro Mondcivitana senĉese subtenadis la edukadon de menciitaj geinfanoj. Ĝi ankaŭ subtenadas la metio-lernadon de knabinoj, kiuj volonte deziras lerni metion (kudrado, frizado, . .). Multaj jam estas en universitato kaj aliaj jam iĝis kudristinoj aŭ frizistinoj.

Pro la pandemio la ĉi-jara disdonado problemiĝis. Manko de donacoj: lernejaĵoj. Tri personoj modeste kontribuis. Temis pri Ĵenja Amis, Avinty en Ĉeĥio kaj Lenka en Ĉeĥio.

Ni multe dankas al ili pro la donacoj. Restas nun la kompletigo de lernejaĵoj kaj la pago de lernokosto. Ni lanĉas alvokon por inviti ĉiujn bonvolemulojn partopreni nian ĉi-jaran kampanjon por kontribui al la lernejigo de geinfanoj. Ni akceptas ĉiuspecan donacon al nia UEA-Konto: hufs-j kun mencio “lernejigo” aŭ per nia PayPal konto: acmbenin@razokama.de




Por protektadi la sanstaton de geinfaoj en la lernejoj, Afrika Centro Mondcivitana decidis havigi maskojn kaj ilojn por lavi la manoj. Pro tio kampanjo en la ligo lanĉiĝis per:

https://www.colleo.fr/cagnotte/18978/masques-et-dispositifs-de-lavage-de-mains

Ni anticipe dankas vin por via kontribuo.
Eblas iom legi pri ni per: www.acmbenin.org

François HOUNSOUNOU,
La prezidanto-Fondinto de Afrika Centro

| | | |
|---|---|---|
| **Espéranto France-Est** http://esperanto.france.est.free.fr. | espéranto France-Est | **Orient-Franca Esperanto-Asocio.** |
| **La Informilo** | Bulletin bilingue d'information sur la langue intemationale **ESPERANTO** | Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo **ESPERANTO** |
| **Rédaction: Redaktoro:** | Edmond Ludwig kaj André Grossmann | S-ro André GROSSMANN<br>5, rue des Pyrénées<br>68390 BALDERSHEIM |

| | | | |
|---|---|---|---|
| Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants: | Article manuscrit à éviter<br>Texte envoyé par courriel doc, odt<br>Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci | un mois<br>3 semaines<br>2 semaines | avant la fin de chaque trimestre |

Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.



| **Komitato de la Asocio** | | **Comité de l'Association** | |
|---|---|---|---|
| Funkcio | Adreso | Telefono | Ret-adreso |
| Prezidanto<br>*Président et secrétaire* | S-ro Edmond LUDWIG<br>26, route de la Schlucht<br>68140 STOSSWIHR | 03.89.77.52.56 | esperanto.eludwig@orange.fr |
| Help-sekretariino<br>*Secrétaire-adjointe* | S-ino Liliane BERSWEILER<br>1 chemin du Lacé<br>54990 XEUILLEY | 03.83.47.41.36<br>06 76 54 77 78 | liliber54@yahoo.fr |
| Kasisto - Redaktoro<br>*Trésorier - Rédacteur* | S-ro André GROSSMANN<br>5, rue des Pyrénées<br>68390 BALDERSHEIM | 09.86.38.78.61 | andreo.ag15@sfr.fr |
| Libroservo<br>*Service Librairie*<br>Vic-prezidanto | S-ro Jean-Luc THIBIAS<br>37, rue Pierre et Marie Curie<br>54500 VANDOEUVRE | 03.83.53.57.54 | jean-luc.thibias@laposte.net<br>libroservo.efe@laposte.net |
| Aliaj komitatanoj<br>*Assesseurs* | S-ro Robert KUENY | 09.71.31.37.62 | kueny.robert@orange.fr |
| | S-ino Micheline COLNOT | 03.83.27.46.93 | michelinecolnot@orange.fr |
| | S-ro Jacques HERLÉ | 03.87.01.00.39 | jacques.herle@laposte.net |
| | S-ro Michel Basso | 03.89.80.86.12 | clbm@orange.fr |
| | S-ino Gisèle BERTAPELLE | 03.83.56.17.37<br>06.80.68.94.78 | bertapelle.gisele@wanadoo.fr |
| | S-ino Catherine HEL | 03.83.47.63.07 | cathello@laposte.net |
| | S-ro Gilbert STAMMBACH | 06 87 40 01 16 | gilbert.stammbach@gmail.com |

| | | |
|---|---|---|
| **Abono al La Informilo** ➔ | 18 eŭroj — reta abono: 7,50 eŭroj | ← *Abonnement à **La Informilo*** |
| Pagoj per ĉeko je la nomo de ➔ | **Esperanto France-Est** | ← *Paiement par chèque au nom de* |
| Pagoj per ĝiro al jena konto ➔ | **CCP 1997 72 W NANCY** | ← *Paiement par virement au compte* |
| Per internacia ĝiro ➔ | IBAN: FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC: PSSTFRPPNCY | |
| Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al ➔ | S-ro André GROSSMANN<br>5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM | Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier |


1. Esperanta-literaturo???
2. Kunveno de Londona Klubo
3. Kunveno de Londona Klubo
4. Kunveno de Londona Klubo
5. Vojaĝado en Ĉinio (Bruno Henry)
6. Vojaĝado en Ĉinio (Bruno Henry)
7. Senutila haltejo
8. Esperanto en Benino
9. Komitatanoj kaj enhavo
10. Angulo + Poemo
11. Edmond Privat
12. La spirito de akvo + Hundino..
13. Tiuj koloroj + Edzino kaj feino
14. Nia Librp-servo
15. Intervjuo de Aleksandra Mussabini
16. Intervjuo de Aleksandra Mussabini
17. Intervjuo de Aleksandra Mussabini
18. Memore al Eugène De Zilah
19. Korona viruso (Bruno Henry)
20. Abonoj kaj kotizoj
21. Enigmoj kaj humuraĵoj
22. Humuraĵoj kaj Dialektiko
23. La Montori-Kaleŝego
24. Muŝ-ribelo Ewa Grochowska
25. Muŝ-ribelo Ewa Grochowska
26. István Nemere, verkisto
27. István Nemere + Rottweil
28. La heredaĵo de Simone Kiry
29. En arbaro
30. Foto-paĝo: aŭtunaj koloroj



**ISSN 0291 6037 trimestriel**
**N° CPPAP : 0409 G 83517**
Bulletin d'information bilingue sur l'espéranto
édité par l'association culturelle
**Espéranto France-Est**
MJC PhiJippe Desforges
27 rue de la République
**54000 NANCY**
Directeur de la publication :
**Edmond LUDWIG**
Rédacteur provisoire : André Grossmann
Dépôt légal : **30 septembre 2013**
*Imprimé par l'imprimerie Sprenger*

ANGULO DE LA PREZIDANTO 192



Karaj gesamideanoj,

Josef SCHIFFER (1939 – 2020)
Fondinto de la Esperanto-grupo
Villingen Schwenningen
Aŭtoro de la lern-metodo Schiffer



Mia trimestra angulo konsistu en pardonpeto ĉe la familio de samideano Josef Schiffer bone konata en nia federacio kaj forpasinta en junio 2020, ĉar en LA INFORMILO 191 anoncinta lian forpason, aperis ankaŭ la nomo Josef Fischer, ĉio tio pro serĉo de informoj pri Josef Schiffer en la reto. Mi ege bedaŭras tiun mankon mian de serioza relego.

Edmond LUDWIG

*Kolego poeto Jean-Pierre MEISTERMANN, grave malsana, sed daŭre verkanta, permesis al mi traduki al Esperanto kaj publikigi en La Informilo unu inter liaj multnombraj poemoj (franclingvaj kaj germanlingvaj).*
*Memorige je suferantoj de la kronviruso. E.L*

***En mi, kiom doloras!***

*Kiam alvenas, pelmele,*
*la tagoj de l'maljuneco kaj ties pensoj,*
*doloroj kaj ĝojoj interpuŝiĝas,*
*aŭ, foje, ili*
*el mia labila memoro*
*flugis tiom for.*

*Restas la momentoj,*
*kunsentitaj momentoj*
*de blua ĉielo, de fulmtondroj kaj pluvegoj.*

*Plurestas la momentoj d'estonto aŭ ne*
*dum la malsano kaj la konfuzego dumjaraj.*
*Nenio kapablas forviŝi*
*funde de mi, la timojn*
*de malfacila mort',*
*kiun mi travivas horon post horo,*
*vekata de miaj noktaj doloroj.*

*Nenio revivigos plu*
*amojn pro mi perditaj*
*kaj la plezurojn de la vivo.*

*Ĉi vivo kiu foriras*
*per paŝoj lentaj kaj disduopaj*
*laŭ aĉa vol' de l'vento!*

*Jean-Pierre MEISTERMANN*
*31-10-2020 00h.10*

Lecionoj por viro Mikaelo Bronŝtejn.

Post la rakontaro *Lecionoj por knabo,* kiun sekvis ankaŭ ties traduko al la franca *Leçons pour un garçon,* nia tra la tuta mondo vojaĝanta bardo, poeto, verkisto, historiisto Mikaelo Bronŝtejn plu rakontas en *Lecionoj por viro* pri la vivo de plur-etnulo, en la tiama plur-nacia komunista Sovetunio.

La viro rakontanta kaj prirakontata en la libreto, estas "produkto de la am-rilato inter ukraina viro kaj juda virino", Li do kreskis en tiuj du hejmaj kulturoj kaj ankaŭ en la tut-landa rusa. Liaj kromaj familianoj eĉ alparencigis kromajn geetnulojn! Kaj tiu plur-etna knabo lernis, studis, amis, amoris, laboris en tut-landa rusdomina ŝtato, kie. . . egalis ĉiuj civitanoj. Almenaŭ teorie, kiel vi tion konstatos!

Ĉu la heroo de ĉiuj 14 rakontoj estas nia konata Mikaelo, tion ni eĉ post finlegado ne vere scias, eĉ se ni retrovas en la rakontaro elementojn, kiujn Mikaelo Bronŝtejn mem rakontis pri sia propra vivo.

Nu: tiuj viv-spertoj de sukcesa soveta kemiisto/esploristo dum la lasta jarcento en Sovetunio proksimigas al ni la viv-malfacilaĵojn en landego, kie la realaĵoj de la vivo ofte ne respondis al la reklamitaj idealoj de paca interhoma kunvivado. Kaj tiajn situaciojn ni des pli profunde memoros, pro la proksimeco al la heroo de la rakontoj.

Tiuj lecionoj por viro rilatas kompreneble al la plej profundaj sentoj inter samfamilianoj aŭ geamikoj, sed tiuj homoj vivas en landego, kie la ŝajno plejofte kaŝas malpli brilan realon, kiam temas pri la inter-homaj rilatoj. Ekzistas rimedo por malpezigi sian konsciencon: figo! Jes, vi legis ĝuste: figo. Sed tion vi malkovros nur en la antaŭlasta rakonto. Ek do al la legado! Indas!

E. L.

Jen artikolo de Edmond PRIVAT, iama ĉefredaktoro de la revuo Esperanto, sed ankaŭ grava ĵurnalisto de la svisa gazeto Le Temps kaj dumtempe eksterlanda korespondanto de tiu gazeto. Li verkis plej ofte pri internacia temaro kaj foje ankaŭ enigis esperantan temaron en siajn franclingvajn artikolojn.

## Vues sur le monde
## Au pays de Tito
Edmond PRIVAT
(le 8 août 1953)

*Le voyageur suisse qui débarque à Zagreb, en Yougoslavie, est immédiatement perdu dans une ville de la grandeur de Zurich, où il ne comprend ni les gens, ni les écriteaux en langue croate. C'est l'espéranto qui nous sauvait, la semaine dernière, car il y a des chauffeurs de taxi et des employés de tramway qui portent l'étoile verte et parlent couramment cette langue.*

*Même le maréchal Tito l'emploie pour accueillir nos délégués et, à l'ouverture du grand congrès universel auquel nous prenions part, le Premier ministre de Croatie et le maire de Zagreb ont fait leurs discours en espéranto, ainsi que les représentants officiels des Gouvernements australien, autrichien, hollandais, suédois et norvégien.*



*Une assemblée de mille huit cents délégués de trente pays est toujours une chose impressionnante. Elle l'est encore plus lorsqu'on y parle une seule langue. Il y avait là quelque sept cents Croates, Serbes et Slovènes, une quarantaine de mahométans de Bosnie et plus d'un millier d'étrangers, dont au moins trois cents Scandinaves. Les petits pays sont au premier rang, et cela repose des conférences où les Américains, les Anglais et les Français dominent toute la scène.*

*Un congrès pareil illustre une espèce de révolte contre le monopole des gros de ce monde. Petites nations et classes moyennes prennent leur revanche sur la prétention des diplomates et des privilégiés à garder pour eux les contacts internationaux. Dans les corridors et sur les terrasses des cafés, on pouvait causer avec l'homme de la rue d'une quantité de pays. Il y avait sans doute un bon quart d'instituteurs et de maîtres d'écoles secondaires. Il y avait aussi des juges, des médecins, des étudiants et même des professeurs d'université pour nous faire des conférences sur leurs spécialités, mais il y avait également des paysans, des employés, des cheminots, des postiers qui tenaient leurs séances de groupes. Une des plus réussies fut celle des fédéralistes, européens et mondialistes.*

*Les soirées étaient consacrées au folklore yougoslave, et tout le monde admirait les magnifiques costumes nationaux des femmes de Croatie, avec leurs broderies rouges et leurs gilets de cuir aux étincelantes paillettes. Plusieurs paysans nous ont parlé très librement du régime en conversation privée. Ils s'intéressent particulièrement à la distribution des terres à ceux qui n'en ont point.*

*Ils sont catholiques et n'approuvent pas la tendance anticléricale des milieux ouvriers, mais ils trouvent que le cardinal Stepinac a commis une lourde faute en s'alliant au Parti hitlérien des oustachis, qui massacrait les familles juives et serbes-orthodoxes avec une cruauté que l'archevêque a sans doute déplorée, mais "à leur avis" avec trop de prudence diplomatique. Ils disent qu'il est bien traité dans son village natal où il réside, mais qu'il a perdu beaucoup des sympathies populaires. Par contre, les églises sont ouvertes, et nous y avons vu célébrer la messe.*

*Catholiques et militants du nouveau régime sont unis sur un point: ils sont heureux du départ des Russes, qui voulaient tout commander. Le sentiment qui domine est certainement celui de l'indépendance nationale: les Croates veulent être maîtres chez eux et sont très chatouilleux, même vis-à-vis de leurs frères serbes. La forme fédérale est la seule viable et se développe lentement. C'est une expérience en pleine évolution.*

*Dans la rue on ne voit pas de mendiants. Tout le monde est vêtu très simplement, mais proprement. Les gens n'ont pas l'air sombre et triste comme en Tchécoslovaquie. Ils sont aimables et l'égalité sociale est visible. Les salaires sont très bas en comparaison avec ceux de Suisse; il faut choisir entre se bien vêtir ou bien manger, et la belle santé des enfants montre où porte le choix. En général, les gens estiment que les conditions étaient beaucoup plus dures sous la royauté.*

*L'opinion la plus courante est que le régime est en pleine évolution et qu'il change de mois en mois, en passant d'une expérience à l'autre. C'est vraiment une chose unique de pouvoir ainsi, par l'espéranto, causer directement avec les paysans et les petites gens d'une nation slave qui a beaucoup souffert et lutté. En quelle autre langue aurait-on pareil contact si l'on n'a pas appris celle du pays? Certainement ni en anglais, ni en français.*

*(le 8 août 1953)*

RAKONTOJ

# LA SPIRITO DE LA AKVOJ

Iam, vojaĝantoj, kiuj alproksimiĝis al la bordoj de torento por plenigi siajn kukurbo-botelojn, vidis kolĉenon de perloj en la profundo. Sendube bela naĝantino faligis ĝin tien. Malgraŭ la malvarma ondo, la plej kuraĝa vojaĝanto plonĝis, etendis sian manon, sed nur alportis reen manplenon da ŝtonetoj. Efektive, ĝuste kiam li ŝajnis teni ĝin, la kolĉeno disfalis inter liaj fingroj.
Liaj amikoj, kiuj estis ĉe la bordo, konfirmis la sorĉon. Ankaŭ ili vidis la kolĉenon disiĝi kaj malaperi.
La vojaĝantoj tiel dum momento restis silentaj sur la bordoj, esplorante la profundojn. Sed, kiam la akvoj reakiris purecon, la braceleto reaperis. Dua vojaĝanto ankaŭ provis bonŝancon. Li retenis la spiron, plonĝis...
Bedaŭrinde, li alportis reen nur kelkajn mortajn foliojn.
- Mi havis ĝin, li ekkriis! Kaj tiam subite ĉio malaperis.
- Ni estas en ĉeesto de akvo-spirito, flustris la pli maljuna viro. Mi apenaŭ povas pensi pri iu alia klarigo.
- Ni foriru de ĉi tie kiel eble plej rapide, aldonis unu el la sen-timaj naĝantoj. Mi ne ŝatas tiujn lokojn.
Kaj ili forkuris, dirante al la najbara vilaĝo, ke ilia rivero estas persekutata de malbonaj spiritoj.
Tamen, kelkajn tagojn poste, vojaĝanto, kiu pasis en ĉi tiuj samaj lokoj, havis pli da bonŝanco aŭ malico. Kiam li vidis la kolĉenon, kiu brilis ĉe la fundo de la akvo, li estis plenkonscia rigardi super sia kapo. Kaj li eĉ ne devis plonĝi en la glaciajn akvojn por preni la kolĉenon, kiu simple pendis ĉe branĉo super la torento.

El hinda fabelo traduko de Bernard BEHRA

**En la filozofia ateliero**

Ni malfidu niajn sentojn. Tiu rakonto ŝajnas diri al ni: la sentoj ofte trompas nin. Ni estu atentemaj! Kion ni konsideras realaĵoj estas kelkfoje nur iluzioj kaj mensogoj.
Sed la homoj estas tiel faritaj, ke ili havas nur siajn sensojn kaj sian percepton por prijuĝi kaj kompreni. Kio restas al ili por alfronti la kaptilojn de la percepto? Ĉu la sperto? Ĉu la racio? Ĉu pridemandi plurajn homojn? Ĉu dubi pri ĉiu realeco?…

Tradukis Bernard Behra, el "Les Philo-fables", (Filozofiaj rakontoj) de Michel Piquemal, Le Livre de Poche, 2010, p. 143.

# HUNDINO KAJ KUNIKLO

El la germana Hamelner Wirtschaftszeitung (Ekonomio-gazeto de Hameln) eksterordinara rakonto pri Polly kaj Nini, malsimila paro.

La ĉas-hundino Polly iun tagon decidis patriniĝi. Ne ke ĝi pensis pri belaspekta, sam-rasa kunulo, ĝi simple adoptis etan kuniklon. Laŭte bojante ĝi forpelis patrinan kuniklon el najbara ĝardeno kaj kaptis novnaskitan, blindan kuniklon. Ĝi deponis ĝin en sian dometon kaj lekante sekigis ĝin. Polly tute ŝanĝiĝis. Ĝiaj posedantoj ne fidis je tiu paco, ĉar Polly estis trejnita ĉashundo kaj Nini sia preferata predo.
Sed kiam iu alproksimiĝis ĝi forte grumblis. Ŝia patrina instinkto estis pli forta kaj mirakle ŝiaj mamoj eĉ produktis lakton. Kiam la eta long-orelulo malfermis la okulojn ĝi post-sekvis sian "patrinon" paŝon post paŝo. Iom post iom Polly iĝis pli alirebla kaj la familiaj infanoj povis eĉ ludi kun Nini. Se Nini iom tro longe restis for, Polly nur devis laŭte boji kaj Nini tuj revenis. Tiu animala idilio daŭris ĝis la plenkreskiĝo de Nini.

Traduko de Hans-Werner Grossmann

RAKONTOJ

# TIUJ KOLOROJ

Iun vesperon Rolando sidis kun sia edzino sur benko sur monteto, kaj kune ili rigardis la subiron, glore brilantan sunon kaj la ĉielon banitan en maro da koloroj. Li prenis ŝian manon kaj klarigis kiel tiuj koloroj aperis kaj kial la suno aperis en ĉi tiu lumo. Kaj ŝi, ŝi aŭskultis kaj ridetis al li. Post iom da tempo ŝi ekridis laŭte kaj diris: "Ĉu tio estas ĉio?" Li rigardis ŝin konfuzita kaj lasis ŝian manon. Li ja esperis iom da entuziasmo por siaj prezentoj, eble eĉ iom da admiro.

"Vi scias", ŝi daŭrigis, "Estas ĉio interesa. Sed mi preferus ĝui la kolorojn, mergi min en ilin, sperti daŭran momenton. Ni nur silentu iom da tempo kaj ĝuu ĉi tiun spektaklon! "

Do finfine li silentis kaj pensadis. Kion ŝi celis? Scio estis grava, sen demando. Sed jes, kial fakte nur scio? Kia mondo tio estus? La amo nur kemia procezo? La naturo nur scienca interrilato? La morto nur nur putro?

"Vi scias", Roland finfine diris mallaŭte, "mi estas unu el tiuj homoj, kiuj estas konvinkitaj, ke scio pli bonas ol kredo. Sed ĉu ambaŭ ne povus resti unu apud la alia? Du malsamaj aspektoj, scioj kaj kredoj, tio estas la fido, ke ekzistas pli ol ni povas klarigi; ke estas io, kio influas nian ekziston, en nia plej interna estado, nin ekscitas, igas nin malĝojaj, esperplenaj kaj memfidaj, sen ke ni devas scii kial. Kiel profunda certeco, kiu plenigas nin per ĝojo, eĉ per feliĉo.

Ambaŭ silentis. Roland demandis sin, ĉu li trovis la ĝustajn vortojn. Certe li plu pensu pri tio.

Tiam li sentis ion varman sur sia mano. Ŝi prenis lian manon kaj kune ili rigardis la subirantan sunon kaj la kolorojn, kiuj unue estis brilaj kaj poste malrapide paliĝis. Estis mirinde.

Teksto de Pastro Stefan Dietrich el "Gemeindebrief reformierte Kirche Muttenz" tradukita de Hans Werner Grossmann.

Skota legendo

# LA EDZINO KAJ LA FEINO

Iun tagon edzino staris ĉe la lav-kuvo, je iu lunda mateno gargarante kaj tordante sian lavaĵon, kaj ŝi ĵetis ĝin en korbon por poste pendigi kaj sekigi. Dum ŝi laboris, ŝi kantis, ĉar estis bela tago por sekigado, kun suno kaj freŝa venteto.

Subite iu frapis ĉe la pordo, kaj la edzino ĝin malfermis por trovi tie etulinon ne pli altan ol duonmetro. Antaŭ ol la edzino povus palpebrumi, enpaŝis la domon la feino (kaj ja efektive feino, ĉar neniu alia estaĵo povus esti tiel eta kaj preciza).

"Mastrinjo", ŝi diris, "donu al mi iomete da faruno".

"Domaĝe", diris la edzineto, "mi apenaŭ plu havas iom".

"Al malriĉulo donu ĉiam iomete, kaj vi neniam suferos mankon", respondis la feino.

Tio tuŝis la bonan koron de la edzino kaj ŝi iris al la farun-barelo kaj elprenis kelkajn lastajn manplenojn kaj ŝutis ilin en la etan sakon, kiun la feino etendis.

"Tiom longe, kiom vi neniam rigardos en la barelon, vi ĉiam ĉerpos al vi sufiĉe per la mano", diris la feino, kaj ŝi ĵetis la sakon trans la ŝultron kaj malaperis tra la pordo, dum la edzino staris kun buŝo gapanta, kaj neniu vorto eliĝis.

Dum sufiĉe longa tempo, ŝi faris laŭ la diro de la feino kaj ĉiam trovis bonan provizon da faruno, sed unu tagon, kiel ofte okazas ĉe virinoj, ŝia scivolemo venkis, kaj ŝi iris kaj enrigardis en la barelon, kaj trovis ĝin malplena, kaj de tiu tempo ŝi devis mem plenigi ĝin.



# El nia libroservo

## Informoj



**⇒ Kiel timite la semajnfino en Rottweil, same kiel tiu de Art Sur Meurthe ne povis okazi, pro tiu aĉa kronviruso! Estas eta espero organizi en 2021 semajnfinon en Art Sur Meurthe la 19/21ajn de marto aŭ la 9/11ajn de aprilo. Sed tio eblus nur se la san-situacio vere pliboniĝus, kaj sufiĉe frue. Do la realigo estas tre dubinda.**

**⇒ Sen la semajnfinoj la libroservo vendas preskaŭ neniujn librojn. Feliĉe, ĉar ĝi havas nek salajrulojn nek lu-prenon pagendajn, ĝi povas pludormi ĝis pli bona tempo. Tamen, sen enkasigo, ĝi ne povas kontribui je vivado de la E°-eldonejoj. Kaj ne eblas al niaj fidelaj klientoj ĉerpi el nia stoko de libroj.**

**Pro tio, mi decidis proponi specifan oferton validan ĝis la apero de la venonta La Informilo: vidu malsupre!**

**Ĝis baldaŭ! Jean-Luc Thibias libroservo.efe@laposte.net**



## Specifa oferto por perkoresponda aĉeto

La libroservo certe ne povas profiti la favorajn afrank-eblecojn donitajn al grandaj ret-vendejoj tamen, pro tiu escepta periodo, ĝi proponas al aĉetantoj jenajn kondiĉojn:

Por aĉeto de **iu nombro** de libroj proponataj de la libroservo, la petita repago de afranko estos:
por adreso en Francio: maksimume **8 €** (proksimume la prezo por 1 kg) aŭ la plej favora poŝta prezo por malpezaj sendaĵoj,
Por adreso en Eŭropa Unio, la maksimuma afrank-prezo estos **15 €** (aŭ malpli se ekzistas pli favora poŝta prezo).

Kelkaj rezervoj:

- la oferto validos nur ĝis la apero de la venonta La Informilo
- ne eblos mendi brokantaĵojn
- krom interkonsento, eblos mendi nur unu ekzempleron de ĉiu titolo
- nur la libroj en la stoko de la libroservo estas koncernataj, Se iu titolo elĉerpiĝis, ĝia mendo estos nuligita!

Kie trovi la titolojn de la libroj?

- en la libroserva paĝo de la pasintaj La Informiloj
- en la retejo: **esperanto.france.est.free. fr → Rubriko "Nia libroservo"**
- se vi ne havas ret-aliron ni povas senpage sendi al vi **la paperan version de la libroserva katalogo**.

Kaj se vi havas plian demandon, vi retu al la retadreso de la libroservo:

### Por mendi librojn:

1. Vi sendas vian mendon
   - per poŝto al: Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE FR-54500 VANDOEUVRE (uzante la ĉi-suban mendilon)
   - per ret-poŝto al **"libroservo.efe@laposte.net"** - nur escepte per telefono: 06-77-90-49-61.
2. Vi baldaŭ ricevos la librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj), pagenda (indikante faktur-numeron) ĉu per:
   - franca ĉeko je **"Esperanto France Est"** sendita al la supra adreso
   poŝta ĝiro al **"Esperanto France Est"** CCP 0 1997 72W NANCY"
   - interbanka ĝiro al **"Esperanto France Est" IBAN** FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150
   **BIC** PSSTFRPPNCY.

| ***Mendilo*** | Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso: |
|---|---|
| S-ro / S-ino | |
| | |
| | |
| En la | Subskribo: |

*Laste ni eksciis, ke membrino de la grupo de Mulhouse-Esperanto troviĝas nun en maljunulejo en Illzach. Edmond kaj Andreo vizitis ŝin komence de oktobro.*
*Ni kune parolis en Esperanto kaj revenis multaj malnovaj memoraĵoj pri ŝiaj nekutimaj travivaĵoj kaj esperantistiĝo en Egiptio.*

# Jes, ni konatiĝu kun Aleksandra Mussabini

*Ni eksciis, ke Aleksandra eklernis Esperanton en 1945 en Egiptio. Ŝi tiam loĝis en Aleksandrio, kie estis relative granda Esperanto-grupo. Malgraŭ ŝia scio pri la franca, germana, itala kaj angla lingvoj, ŝi, ŝia fratino kaj ŝia patrino ne povis komuniki kun polo, kaj tiam ili eklernis Esperanton.*
*Dum la dua mondmilito, tiu polo estis oficiro en la brita armeo. Deĵorante tiam en Aleksandrio, li konatiĝis kun Aleksandra kaj ties familio pere de angla esperantisto, s-ro Holt ankaŭ deĵoranta tie. Fakte s-ro Holt lernis la francan lingvon kun la patrino kaj post la kurso, la lernanto instruis Esperanton al la instruistino kaj pli poste al ceteraj familianoj. Rapide ili konatiĝis kun la pola "onklo" ankaŭ esperantisto kaj estimata de ĉiuj. Tri monatojn poste ili jam parolis la lingvon kaj eĉ instruis ĝin per la libro "Ellernu" de  Ferenc Szilágyi. Per tiu libro ŝi kun patrino kaj fratino mem lernis Esperanton.*



En la jaro 1945 la Esperanto-grupoj en Egiptio.






Aleksandra troviĝas en la mezo kun koliero. Apude estas ŝia fratino. La ridanta sinjorino en la unua vico estas ŝia patrino. La pola "onklo" estas sub la stelo. S-ro Holt sidas maldekstre en la unua vico. En 1986 li eĉ ĉeestis la francan nacian kongreson en Gérardmer.

Por La Informilo Edmond kaj Andreo intervjuas Aleksandra.

**LA INFORMILO:** Saluton Aleksandra, ni ja eksciis, ke vi eklernis Esperanton en Egiptio en la urbo Aleksandrio, kie vi jam spertis viglan Esperanto-vivon. Tio ŝajnas iom nekutima travivaĵo, tial ni volonte ŝatus scii pli multe pri via vivo kaj pri Esperanto en Egiptio.

**Aleksandra:** Saluton! Pro tio, ke pluraj gesamideanoj interesiĝas pri mia esperantistiĝo kaj naskiĝo en fora lando, mi volonte rakontos al vi iom resume. Krome mi tre sincere dankas vin pro via hodiaŭa vizito. Do, 3 el miaj geavoj estis ĉeĥaj kaj naskiĝis en Bohemio. Unu estis el Malto kaj naskiĝis en Aleksandrio. Tiam Malto estis brita. Mia avino iris Aleksandrion kaj okupiĝis pri la familio de mia avo. Ili tiel konatiĝis. Sed ŝi tiam parolis nur ĉeĥe kaj germane. Finfine ili geedziĝis kaj vojaĝis al Mozambiko, kie mia avo trovis interesan laboron. Tie naskiĝis miaj patrino kaj onklino. Sed pro risko de malario ili revenis al Aleksandrio.

**LA INFORMILO**: Kiam okazis tio?

**Aleksandra**: Ĉirkaŭ 1900, fine de la 19a jarcento, komence de lasta jarcento.

**LA INFORMILO**: Kaj viaj gepatroj?

**Aleksandra:** Rilate miajn gepatrojn, mi scias, ke mia avino kaj mia patrino (tiam 26jara) vojaĝis al Prago por renkonti mian patron (ŝajne jam konata de ili). Ili geedziĝis tie kaj post kelkaj monatoj venis Aleksandrion, kie mi naskiĝis.


Ermina pruntedonis la nigran vestaĵon. Mi tre ŝatis kaj ofte vizitis ŝin, kie ŝi kaj familio havis povran loĝejon sur la tegmento-teraso. La edzo estis nia pordisto.

**LA INFORMILO**: Kian naciecon havis viaj gepatroj?

**Aleksandra:** Mia patrino estis brita kaj mia patro ĉeĥa.

**LA INFORMILO:** Kian lingvon vi parolis tiam?

**Aleksandra:** Germane kun mia ĉeĥa avino kaj itale kun mia malta avo. Jes, mi vizitadis germanan lernejon, kie mi lernis ankaŭ la francan kaj la anglan. Ĝi estis bonega lernejo kun germanaj fratulinoj. La lernejo **ankoraŭ** nun ekzistas, sed la fratulinoj estas nun koptaj. Sed mi parolis ankaŭ itale kun la homoj kvankam mi ne lernis ĝin. Mi estis 7-jara knabino, kiam mia patro reiris al Prago por elteni stomak-operacion. Li estis longe malsana, sed ni daŭre korespondis germanlingve.


Mi en nigra egipta vestaĵo

**LA INFORMILO**: Ĉu en Aleksandrio estis multaj eksterlandanoj?

**Aleksandra:** Jes multaj, estis italoj, maltanoj, grekoj, britoj, francoj, germanoj, poloj, jugoslavoj, armenoj ktp.

**LA INFORMILO**: Kiaj estis viaj kontaktoj kun la loĝantoj?

**Aleksandra:** Libananoj, sirianoj parolis france. Jes multe da geamikoj de mia patrino parolis france. Ankaŭ kelkfoje necesis paroli arabe. Sur la strato oni ofte aŭdis la italan.

**LA INFORMILO**: Kial estis tie tiom da eksterlandanoj? Ĉu pro la laboro?

**Aleksandra**: Jes efektive. La egiptanoj estis malriĉaj kaj ne tiom edukitaj. Por la eksterlandanoj estis multaj lernejoj. Sed dum la milito ni ne rajtis paroli pri politiko en nia lernejo.

**LA INFORMILO**: Kaj en kiaj cirkonstancoj vi eklernis Esperanton.

**Aleksandra:** Mia patrino instruis tajpadon kaj la francan lingvon. Ŝi instruis ĝin al iu anglo s-ro Holt, kiu estis esperantisto. Pere de li ni konatiĝis kun Esperanto, lernis la lingvon kaj havis kontakton kun aliaj gesamideanoj en Aleksandrio. Fakte s-ro Holt post la kurso de franca lingvo instruis Esperanton al la instruistino kaj pli poste al mi kaj al mia fratino. Rapide ni konatiĝis kun pola "onklo" estimata de ĉiuj. Tri monatojn poste ni jam parolis la lingvon kaj eĉ instruis ĝin per la tre bona libro "Ellernu" de Ferenc Szilágyi.


Mi troviĝas en la dua vico maldekstre kun samklasaninoj.

**LA INFORMILO**: Ĉu vi iel aktivis en la movado?

**Aleksandra**: Jes, mia patrino iĝis FD por instruado, mia fratino por turismo kaj mi por korespondado. Mi ricevis ĉiu-tage leterojn el diversaj landoj, kun petoj pri korespondantoj en Egiptio. Ne trovante iun, mi mem respondis kaj subite mi havis 28 leter-amikojn en preskaŭ ĉiuj kontinentoj, speciale en Eŭropo. Kelkaj ĉesis korespondi, aliaj forpasis. Kun s-ro Holt kaj dana leter-amiko, kiujn mi persone konis, mi longe korespondis. Ambaŭ forpasis post preskaŭ 50 jaroj da fidela korespondado. S-ro Holt eĉ vizitis min en Illzach kaj kune partoprenis la tiaman nacian kongreson en Gérardmer.

**LA INFORMILO**: Kia estis la etoso en Aleksandrio?

**Aleksandra**: La etoso estis vere simpatia. Ni havis belan ĉambron por kunveni kaj por instrui. Ankaŭ en la kadro de kristanaj asocioj YMCA por la viroj kaj YWCA por la virinoj.

**LA INFORMILO**: Tamen poste vi forlasis Egiption, pro kio?

**Aleksandra**: Post la fino de la milito, en 1945, britaj kaj aliaj armeanoj forlasis Aleksandrion. Mi naskiĝis kaj edziĝis en Aleksandrio, sed kiam mia edzo estis maldungita pro tio, ke nur 10% da eŭropanoj rajtis labori tiutempe, ĉar lokaj loĝantoj estis prioritataj, ni planis forveturi.

**LA INFORMILO**: Kien vi tiam veturis?

**Aleksandra**: Laŭ mia bofrato tiam loĝanta en Kimrio, mia edzo trovos laboron tie, li estis akceptita nur kiel mekanikisto en karbo-minejo, kie laboris kelkaj ali-landanoj. Post pluraj monatoj mia edzo skribis al sia frato en Aleksandrio petante, ke li faru sian eblon, vidu influ-havajn personojn ktp.. ĉar li deziris reiri Aleksandrion. Tie en Bridgend naskiĝis mia unua filino.




Supre de maldekstre: la pola onklo, la ĉefdelegito en Egiptio Tadros Megali. Sube: mia fratino, mia patrino kaj mi.

**LA INFORMILO**: Do tio ne estis via definitiva reveno al Eŭropo. Ĉu li sukcesis en tiaj klopodoj?

**Aleksandra**: Pro tio, ke ni jam definitive forlasis Egipition, nia situacio estis malfacila; ni atendadis kaj fine sub-aĉetante iujn personojn, ni sukcesis revenvojaĝi. Post longaj monatoj, mia edzo sukcesis ree labori, kie antaŭ 2 jaroj, li estis maldungita. Ĉar oni ja ne trovis taŭgan anstataŭanton. Intertempe li faris dung-peton ĉe la mara kompanio de Suez-kanalo. Kiam alvenis la pozitiva respondo, ni ree transloĝiĝis... al Port-Fouad, urbeto aliflanke de Port-Saïd trans la kanalo. Oni simple transiris la Suez-kanalon dum kelkaj minutoj per pram-ŝipo.

**LA INFORMILO**: Kia estis la vivo tie?

**Aleksandra**: La laboro kaj la vivo estis agrablaj, tie ankaŭ naskiĝis mia dua filino. Sed en julio 1956 Nasser, la tiama prezidento de Egiptio naciigis la Suez-kanalon. Ni ankoraŭ troviĝis en Port-Fouad kiam en la nokto de la 5/6aj de novembro, francaj paraŝutistoj okupis la urbon, kiu kapitulacis. Dum la tago ni vidis la francajn paraŝutistojn malsupreniri; same okazis en Port-Saïd, sed tiuj estis anglaj. En decembro ni forlasis Egiption por ĉiam.


Antaŭ la sfinkso Junio 1947

**LA INFORMILO**: Ĉu tiam vi venis al Francio?

**Aleksandra**: Jes, je Kristnasko ni atingis Toulon kaj per speciala aŭtobuso ĉiuj enmigrantoj estis veturigitaj ĝis Cavalaire-sur-Mer, kie ni pasigis proksimume unu monaton en malplena hotelo. Feliĉe ne estis turisma sezono.

**LA INFORMILO**: Kaj kial vi finfine venis al Alzaco?

**Aleksandra**: Intertempe mi skribis al geamikoj de mia edzo.. germanlingve, kaj dum ili troviĝis en Usono kaj jam sciante pri la eventoj en Egiptio, ili informis nin, ke ilia domo en Lautenbach-Zell (proksime de Guebwiller) estis je nia dispono.

**LA INFORMILO**: Do vi ne tuj atingis Illzach, kie vi nun loĝas?

**Aleksandra**: Post proksimume unu jaro ni transloĝiĝis al Mulhouse, kie mia edzo trovis laboron; poste ni ree transloĝiĝis, al Illzach, ĉar tie estis apartamento je nia dispono, kiun post kelka tempo, ni aĉetis.

**LA INFORMILO**: Ĉu vi tiam perdis kontaktojn kun Esperanto?

**Aleksandra: En 1977 mi legis anoncon pri Esperanto en la loka ĵurnalo, kaj eĉ aperis artikolo en la gazeto fare de** s-ro Lienhardt. Lin mi kontaktis kaj poste konatiĝis kun vi, André Grossmann! Antaŭ tiu hazardo, mi tute ne sciis, ke ekzistas Esperanto-movado ĉi-tie.

**LA INFORMILO**: Ĉu vi estas kontenta pri via vivo en Francio kaj pli precize en Alzaco.

**Aleksandra**: Je Kristnasko 2006 ni festis la 50-jariĝon de nia alveno en Francio. Mi aldonas, ke mi estas feliĉa troviĝi en Alzaco; verŝajne tio memorigas mian infanecon, kiam mi parolis kaj kantis germanlingve en lernejo kaj hejme. Mi neniam preterlasas la okazon aŭskulti la belajn kanzonojn ĉe la germanaj televidaj kanaloj. Tamen kun la najbarinoj, krom la francan,mi pli ofte parolas itale ol germane.

**LA INFORMILO**: Se mi bone komprenas, vi daŭre flegas la 5 lingvojn, kiujn vi konas, germanan, anglan, francan, italan kaj Esperanton.

**Aleksandra**: Jes, mi ŝatas la lingvojn. Mi ofte konsultas vortarojn por koni novajn vortojn en la 5 lingvoj. Krome mi profitas la okazon povi uzi ilin.

**LA INFORMILO**: Ni kore dankas al vi.

## **Memore al Eugène de Zilah**, de Bernard BEHRA

Forpasis la 2-an de oktobro 2020 eksa membro de Espranto France-Est, Eugène de Zilah. Nia estraro plej sincere kondolencas al la familio.



Atendante mian vicon en la senfina linio de la mortontoj, mi salutas ĉiujn mortintojn kaj nun nian eminentan amanton de Esperanto: D-ron Eugène de Zilah.

Mi substrekas, ke tiu homo, certe verkisto, filozofo, humanisto, libera pensulo, pli ol liberecano, do laŭ mi individua liberecano, faris el sia propra vivo mem verkon.

Eugène maksimume kaj ofte sen limoj ĝuis pri ĉio, kion la vivo permesas dum tiu ne-vortigebla, do samtempe mirinda, terura kaj bedaŭrinde kelkfoje abomena, spertado de la konscia individua ekzistado.

Forta karaktero kaj personeco, Eugène ĉiam malakceptis, kaj eĉ povis kolere ribeli, kiam li sentis ian ajn premon por malebligi lin pensi kiel li volis, iri kien li decidis aŭ fari kion li elektis, same li tute ne akceptis iajn ajn devigojn, kiam li ne tute libere mem, kaj nur li mem, decidis tion.

La Esperanto komunumo grave ŝuldas ion al Eugène de Zilah en diversaj kampoj nome literaturo, humanismo kaj filozofio. Oni por eterne kalkulos lin inter niaj diligentaj kolegoj, kiuj tiom faris por vivigi Esperanton ĉefe ĝian spiriton de libereco, amo de ĉiuj kulturoj kaj lingvoj, do ĉio kio ĉefe koncernas la homojn, la homecon kaj la homaron.

Al la filo, bofilino, nepoj kaj al ĉiuj, kiuj amis Eugène de Zilah, mi prezentas miajn kondolencojn.

Bernard Behra, Masevaux, Alta Alzaco, la 6an de Oktobro 2020.



Senkultura homo estas sklava besto (Cicero)

ISSN 0299-6987

LA GAZETO

ENHAVO

PONTIO PILATO, LA BELETRA
Eugene DE ZILAH ... 3
EL VIAJ LETEROJ ...
Anatolo GONĈAROV
Johan'-Luko TORTEL
Petro BRAŬN, Jean AMOUROUX ... 12
ABONHELPA FONDUSO ... 13
LA FENOMENO BURTON!
Petro BRAŬN ... 14
LINGVA STAFETO
HU GUOZHU ... 16
POŜTARTAĴO
NULA HORO ... 22
DEBATOJ
• Marĝene de la artikolo de Pokrovskij
László I. TÓTH ... 23
• Pri la artikolo "la"
Jean AMOUROUX ... 24
• En Pireneoj Orientaj
rakonto (sen artikolo)
el *La belga sonorilo*, 1903
Paul BERTHELOT ... 25
SUR INSULO DEZERTA
Libroj por legi kaj relegi
Madeleine DE ZILAH ... 26
Kritika ekskurseto 'sub fremdaj ĉieloj'
*Sub fremdaj ĉieloj*
de Edwin DE KOCK
recenzo: Christian DECLERCK ... 28
PROVERBO-ĈIFRO 'PĈ-141'
Nora CARAGEA ... 29
OMAĜAJ RONDELOJ
*Ĉina galerio – 108 Rondeloj de Guozhu*
de Hu Guozhu
recenzo: Catherine ROUX ... 30
IEK 2009
en Kondoros, Hungario, pri
*Humura literaturo en Esperanto* ... 30
ĈU VI JAM SCIAS ...?
pri OSIEK-premio,
Zamenhof-festo,
libroj kaj verkoj ... 31

LITERATURAJ AVATAROJ DE PONTIO PILATO

ENIGMA ĈINA PENTRAĴO EN SVEDA MUZEO

numero 141 3-a de la 24a jaro 15mar09

**Postskribo:**

*Antaŭ ol mi estis kapabla skribi ion (la ĉi-supran tekston) pri Eugène de Zilah, mi ĉi-matene, legis tekston el Tiele parolis Zaratuŝtra, libro por ĉiu kaj neniu, de Friedrich Nietzsche, traduko de W. A. Verloren van Themaat, eld. Fondumo Esperanto, p. 160-162. Vidu ĉi-kune la eltiraĵon.*

*Tiu teksto de Nietzsche, estas, laŭ mi tute akurata por mediti okaze de la forpaso de Eugène de Zilah. Jes, Eugène estis tia Zaratuŝtra, kiu provis kompreni la homojn kaj komprenigi al ili kiom grave estas ĝui la homan sperton de la konscia vivo dum ĝi okazas. En tiu rakonto Zaratuŝtra renkontas du homojn:*

*- Gnomon al kiu Zaratuŝtra klarigas, ke nun estas la momento elekti la vojon, kiun li volas sekvi, sed la Gnomo murmuris …*

*- junan paŝtiston, el kies buŝo pendis nigra peza serpento (ĉu temas pri malbonaj-kontraŭ liberecaj-pensoj?), al kiu Zaratuŝtra post malsukceso liberigi la homon el la serpento, kriis "mordu kaj senkapigu la serpenton". Tion la paŝtisto faris kaj kraĉis la kapon de la serpento. Tio trans-figuris la paŝtiston, kiu ridis kiel neniam homo surtere ridis.*

*Strangaj sintenoj de la homoj, sed Zaratuŝtra respektas tiajn sintenojn kaj li ne satiĝas travivi tiujn spertojn: instrui la homojn aŭ simple komprenigi al ili pri libereco iri, fari kaj pensi kaj kiel liberigi sin el mem-sklavigo, tio ankaŭ entenas la akcepton, ke la homoj faras el tiu libereco, kion ili volas, eĉ se kelkfoje tio povus ŝajni terure stranga aŭ stulta.*

*Mi pensas, ke Eugène estis tia Zaratuŝtra, kiun ni bezonas por esti plene responsa pri niaj elektoj. Pro tio la ekzistado de Eugène de Zilah kaj lia verkaro tute ne estas vanaj por la homaro.*

*Bernard Behra*

## Kronvirusa pandemio en Europo kaj en ĉinio
Informas Bruno Henry

**La 9-an de septembro 2020**, dum rekomenciĝis dua epizodo de la kronvirusa pandemio en Eŭropo, nia samideano Bruno HENRY - vivanta kutime kun sia edzino duonjaron en Ĉinio kaj duonjaron en Francio – informis nin jene:

Kara samideano,

En nia urbego Changsha la situacio ŝajnas normala.
Mia edzino diras, ke laŭ la oficialaj informoj la situacio estas normala. Homoj, kiuj kunportas viruson ĉefe venas el eksterlando.
En Changsha ni devas surmeti maskon en la metroo.
Matene mi estis en la hospitalo de la kvartalo kaj tie ĉiuj homoj devas surmeti la maskon. Ankaŭ same kiam mi vizitis la oficejon pri publika sekureco, kiu donas vizon.
Surstrate tre malmulte da homoj surmetas maskon eĉ en busoj, vendejoj kaj restoracioj. Homoj diskutas proksime de la aliaj kaj manĝas kune.
Feliĉe la ĉinoj ne interkisas, manpremas kaj brakumas kiel la francoj. Mi estas singardema, mi surmetas maskon surstrate, kiam estas multaj homoj kaj en vendejoj.
Dum la krizo mi rigardis la ĉinan televidon en la franca CGTN por scii, kio okazas. Mi informiĝis multe per CGTN, sed mi delonge rimarkis, ke en tia ŝtata amaskomunikilo ne estas kritiko. Do, mi ne plus rigardas ĝin.
En marto kaj aprilo la krizo estis pli terura en la Wuhan-provinco kaj la Hubei-provinco. Ĉi-lasta najbaras nian provincon Hunan. La popolo devis resti hejme dum 75 tagoj kaj ne rajtis eliri de la loĝejo por aĉeti manĝaĵon. La ŝtato blokis Wuhan kaj la tutan Hubei (60 milionoj). Dume en nia urbo mi promenis ĉiutage. Tre malmulte da homoj estis ekstere dum du monatoj kaj la trafiko malmultis. Oficiale ne multe da homoj infektiĝis en Hunan.
Mi revenos al Francio la 4-an de novembro. Flugkompanioj nuligis mian flugojn en aprilo, julio, kaj septembro pro la viruso. La ŝtato ne permesas multe da flugoj. Nur 3 flugoj iros kaj revenos ĉe Air France. Same por la ĉinaj flugkompanioj. Kiam oni revenas al Ĉinio, la vojaĝantoj devas kvaranteni en hotelo dum 14 tagoj.
Jen la novaĵoj.

Amike 29 09 2020 Bruno Henry

**CGTN-Français** (eksa *CCTV-Français - China Global Television Network-Français*) estas franclingva ĉina televida kanalo elsendanta internacie. Ĝi estas parto de la Ĝenerala Ĉina Televidsistemo.

**La 11-an de novembro 2020 alvenis plia mesaĝo:**

Kara samideano,

Mi revenis en mian francan hejmlokon la 4an de novembro post laciga vojaĝo. Mi ne tuj respondis al vi, ĉar mi estis tre laca kaj devis zorgi pri diversaj aferoj post 14 monatoj en Ĉinio. Entute, de mia ĉina hejmloko (en Changhsa) ĝis mia franca hejmloko (Fameck) mi vojaĝis 36 horojn. Kutime mi vojaĝas dum 24 horoj. La aviadilo de Shanghai al Parizo flugis 15 horojn, ĉar ĝi haltas dum unu horo en Seulo. En normala tempo ĝi flugas rekte al Parizo dum 11h30. Aliaj veturtempoj okazis en metroo, trajnoj, buso kaj mi atendis en flughavenoj kaj stacidomoj. Nuntempe trafikas malmulte da aviadiloj inter Ĉinio kaj Francio.

Antaŭ ol eniri en la aviadilon, ĉirkaŭ 40 ĉinaj laboristoj, kiuj veturis al Afriko por labori, surmetis blankajn kombineojn, kiuj kovris la tutan korpon kaj kapon. Krome ili surmetis la maskon kaj larĝajn okulvitrojn. Tio impresis min! Mi iom timis, ĉar la aviadilo (Boeing 777) estis preskaŭ plenplena (eble iom malpli ol 300 pasaĝeroj). La flugkompanio Air France diris, ke la tuta aero ŝanĝiĝas post ĉiuj 3 minutoj.

Mi kunportis francan atestilon pro bona sanstato kaj teston PCR. En Shanhajo oni apenaŭ rigardis ilin kaj en la pariza flughaveno "Charles De Gaulle" oni ne petis ilin de mi. Nur doganistoj inter Metz kaj Hagondange petis la atestilojn.

Nun la situacio pri la viruso en Ĉinio estas stabila.

Amike Bruno Henry

# ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2021 ĝis 2023

Nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevitaj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de la impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Tial ni povas proponi al vi kotizon je 20 eŭroj el kiuj 66% povas esti dekalkulitaj de viaj impostoj. Tiam entute vi estos paginta 20 - 66% = 6,80 eŭroj, sed nia asocio estos tamen ricevinta 20 eŭrojn. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

La atestoj rilatas al pagoj de *kotizoj kaj donacoj* ricevitaj en 2020 (principe ĝis la 31a de decembro) por la imposto-deklaro de 2021.

Bonvolu trovi ĉi-poste la tarifojn por la venontaj 3 jaroj. Ni proponas al vi jam nun, antaŭ la fino de 2020, pagi vian abonon al **La Informilo** laŭ la ĉi-suba tarifo. Ni povas ankaŭ proponi al vi retan version en formato pdf favor-koste kompare kun la papera versio.

Krome vi povas elekti inter la 2 membro-kotizoj por nia asocio, laŭ via situacio rilate al impostoj.

| | | Jaroj: | 2021 | 2022 | 2023 |
|---|---|---|---|---|---|
| | | Abono por la papera versio: | 18 eŭroj | 18 eŭroj | 18 eŭroj |
| | | Abono por reta versio en formato pdf: | 7,5 eŭroj | 7,5 eŭroj | 7,5 eŭroj |
| | | Federacia kotizo: | 7 eŭroj | 7 eŭroj | 7 eŭroj |
| | | Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj: | 20 eŭroj | 20 eŭroj | 20 eŭroj |
| UEA 2021 | MB | • Individua Membro Baza, kun reta aliro aŭ UEA-servoj: reta revuo Esperanto, Delegita Reto (reta jarlibro) | | | 44 eŭroj |
| | MA | • Individua Membro-Abonanto: kun ĉiuj retaj servoj, kiu aldone ricevas la revuon **Esperanto papere** | | | 74 eŭroj |
| Pag-manieroj | 1. | **Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio:** Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY<br>Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo.<br>La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto: | | | |
| | 2. | **Per bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de:** Esperanto France-Est sendita al jena adreso:<br>S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio<br>Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al .... ktp por 2021, 2022 | | | |
| | 3. | **Per internacia aŭ reta ĝiro** je la nomo de Esperanto France-Est kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY<br>(Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adres-kodon) | | | |
| | 4. | **Al UEA-konto de TAKE ekat-i (menciu la celon de via pago kaj vian adres-kodon)** | | | |

Libroj eldonitaj de Esperanto France-Est aŭ akireblaj ĉe nia kasisto

**"De Karlis al Carlo Rememoroj"**
Kortuŝa rakonto pri la travivaĵoj de Carlo Nicolodi en malfacila periodo de la dua mondmilito, de Latvio al Italio, filo de Esperanto-paro, latva kaj itala. 12 + 4,24 = 16,24 eŭroj

**Momerige al Roger Imbert (1938—2009)**
Li ne iĝis profeto en sia lando (Francio) sed eminenta esperantisto en Zagrebo (<kroatio) 4+2,12=6,12 eŭroj

**Paul-Georges KOCH (1908 - 1982)**
Eta selekto de poemoj tradukitaj el la germana fare de E.Ludwig 1,50 + 2,12 = 3,62 eŭroj

**Knabaj petolaĵoj** Poemoj de Gérard LESER en la alzaca, tradukitaj al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 2,12 = 3,62 eŭroj


**La harplektaĵo de Sylvie Reff** Poemoj en alzaca kun traduko al Esperanto de E. Ludwig 1,50 + 2,12 = 3,62 eŭroj

**Etaj rakontoj pri al Katedralo de Strasburgo**
Ĝin verkis kaj kompilis Sûzel PAILHES. Ĝi aperis en 12 lingvoj. En la Esperanto-versio ankaŭ aperas la hispana kaj la rusa lingvoj, 48-paĝa libro kun tre solida kovril-paĝo 12 + 8 = 20 eŭroj

**"Gardu vin, knabo!"** Historiaj rememoroj de Armand Hubert dum la dua mondmilito. 1 + 2,12 = 3,12 eŭroj

**Konstruado-kajero de TAKE 2020**
La ĉi-jara temo estas "Fenestroj" kun 9 arikoloj de diversaj aŭtoroj 8+2,12=10,12 eŭroj

# Ni lernu per enigmo kaj humuraĵoj



**HORIZONTALE:**
1. Helik' aŭ limak'.
2. Malgranda, glathaŭta acideta ber', ruĝa aŭ nigra. Ĉefurbo en Kebekio.
3. Gras'. En la centro de astmo.
4. Persono, kiu praktikas la principojn de homa kondiĉo.
5. Aliteraci'. Interjekcio uzata por esprimi malkontentecon.
6. Litera nomo. Regnokodo de Turkio. Jararo, prezentanta apartan propran karakteron.
7. Konjunkcio. Prepozicio.
8. Kaŭzo. Seksa inklin'.
9. INVERSE:stat' kaŭzata de troa trinko de alkoholaĵoj. Admirinde.
10. Difinita etendaĵ' de lando, regiono . INV:nombro.
11. La Tria ordeno de la anĝeloj (laŭ Biblio). Numeralo.

**VERTIKALE:**
1. Specialist' pri la lingvaj reguloj.
2. Grava malsano kaŭzata de retroviruso HIV. Ag' moviĝi.
3. Kruda gardisto, kiu komisie plenumas perfortojn. Meblo.
4. Nom' de la avarulo de Venecio en la itala komedio.
5. Prefikso. Guto, kiu elfluas el la okuloj. Litera nomo.
6. Membran' en la okulo.
7. Siberia river'. Skizo de teatraĵo, prezentanta la ĉefajn scenojn.
8. Epidemia malsan'. Ĝermita sekigita greno, uzata por fabriki bieron.
9. Ĝenr' de polpoj. Hom'.
10. Konstruaĵ' por homloĝado. Societ' de sciencistoj, literaturistoj aŭ artistoj.

Kuracisto informiĝas ĉe sia paciento. **G.J.**

*"Lastfoje mi priskribis al vi supozitoriojn, ĉu ili bone efikis?*
*- Hem, estimata Doktoro, mi konfesu al vi, ke tio surprizis min, ĉar la aĵo pastiĝas kaj poste algluiĝas al la dentoj. Sed trankviliĝu, mi ja iom alkutimiĝis".*

Por provi vendi sian aŭtomobilon, tiu viro metis afiŝeton sur la malantaŭan vitron de sia aŭto. Sur ĝi estis bone legebla la numero de lia poŝtelefono.
Li trankvile veturis al sia laborejo, tiam sonoris lia poŝtelefono. Li tuj prenis ĝin kaj aŭdis:
"*Bonan tagon! Ĉi-tie polico.. Ni sekvas vin. Ĉu vi scias, ke estas malpermesite telefoni stirante? Bonvolu halti ĉe vojrando!"*

Juna virino vizitas malnovan skotan kastelon. La gvidisto scivoleme demandis ŝin, ĉu ŝi ŝatis la viziton.
Fakte ŝi kuraĝis konfesi, ke plurfoje ŝi iom ektimis vidi fantomon!
"*Estu kvieta, sinjorino, neniam mi renkontis fantomon ĉi tie, de kiam mi deĵoras!*
*- Kaj kiam vi dungiĝis?*
*- Momento...Jes! Antaŭ tri jarcentoj!"*

Aŭtomobilisto estas ekscitita, ĉar li ne retrovas sian aŭton. Li vidas policiston kaj tuj alparolas lin.
"Sinjoro, imagu, iu ŝtelis mian aŭton, kiu staris ĉi-tie antaŭ la butiko de tiu ŝuisto!"
La policisto provas afable trankviligi la viron...
*"Ĉu vere? Tiam vi certe bonŝancis! Ĉar se mi estus vidinta ĝin, vi certe estus ricevinta monpunon, ĉar tie ja troviĝas panelo "malpermeso parki!"*

Tiu patrino vizitas okuliston kune kun sia eta filo.
La okulisto demandas:
"*Ĉu via fileto jam spertas vid-problemojn?*
*- Ne, tute ne! Li akompanas min por helpi min por legi la literojn. Mi ja ne scipovas legi!"*

Okaze de parola ekzameno la deĵoranta profesoro demandas al studento pri juro:
"*Kio estas fraŭdo?*
*- Fraŭdo estas ĝuste tio, kion vi faras, estimata profesoro!*
*- Tamen, bonvolu klarigi al mi...*
*- Laŭ la puna-kodo, kiu profitas pro la neklereco de aliulo, kun la celo damaĝi al li, ja kulpas pri fraŭdo!"*

Viro, iom ebria, timas reveni hejmen tro malfrue, tial li informiĝas ĉe apuda trinkanto..
"*Mi mi petas ĉu vi povas sciigi al mi la horon?*
*- Post du minutoj estos noktomezo..."*
La viro malkontente reagas kaj eĉ koleras...
*"Mi volas koni la nunan horon!.....Ne tiun postan, post du minuto!"*

Direktoro de firmao malkontentas kaj grumblas al sekretariino...
"*Fraŭlino, bonvolu korekti tiun leteron kaj ne komenci per "Kara amiko". Vi ja scias, ke temas pri vera fripono!"*
La virino tute trankvile korektas kaj skribas:
*"Kara kolego!"*

**SOLVO 191:**
**Horizontale**:
1.ZIMBABVANO. 2.ENERGI. 3.BOL. ADORAD. 4. ARMORIKO. 5.UNUE. EKS. 6.ARK. MES. EK. 7. ONOEN. TALI. 8.ROLP. BOV. 9.IOMETE. 10.OLOK. KELTO.
**Vertkale**:
1.ZEBR. AORTO. 2.INO. URNO. 3.MELANKOLIO. 4. BR. RU. EPOK. 5.AGAMEMN. 6.BIDO. BEK. 7. OREST. TE. 8.AFRIK. ABEL. 9.AKSELO. 10.ONDO. KIVIO.

En psikiatria malsanulejo, paciento trairas la aleon, kun kvazaŭa stirilo enmane kaj imitante la bruon de motoro, kaj okaze kun laŭta sono por averti preterpasantojn..
*"Sed kion vi faras tiel?"* demandas flegistino
"*Atentu sinjorino, mi petas vin, se ne mi riskas renversi vin!*
*- Kvietiĝu! Vi ja ne estas aŭtomobilisto, sed simpla pied-iranto en ĉi-tiu aleo!"*
Alia renkontita paciento protestas:
*"Sinjorino, ne oportunas tion rakonti al li. Komprenu, ke li tiom sentas sin veturilo, ke ĉiu-matene post la duŝo, li donas al mi 30 eŭrojn, por ke mi poluru lin!"*

**Kosmetiko. "***Malgraŭ la progresoj en la kosmetikaĵoj, iuj virinoj tamen maljuniĝas tre rapide!!"*
*"Kial do? "*
*"Ekzemple mia edzino. Kiam ni konatiĝis, ŝi estis 20-jara, kiam ni gefianĉiĝis, ŝi estis 25-jara, kiam ni geedziĝis 29-jara, kaj ĉio tio en la daŭro de unu jaro!"*

**Simileco.** *"Mia edzino estas tre dolĉkora. Kiam ŝi vidas iun, kiu ploras, ŝi tuj kunploras."*
*"Mia edzino similas al ŝi. Kiam ŝi aŭdas iun grumbli, ŝi tuj kungrumblas!"*

**Pasinto.** Du emeritoj diskutas pri komuna amiko. *"La maljuna Gustavo ŝajnas vivi nur en la pasinto."* Deklaras unu.
*"Kial ne?"* opinias realisme la alia, *"Finfine li tiel vivas malpli koste!"*

**Helpo.-***"Vi aspektas vere malbonfarta, kara amiko!"*
*"Ja ekde unu semajno mi fermis eĉ ne unu okulon. Se ĝis morgaŭ mi ne sukcesas trovi 20 000 eŭrojn, mi bankrotos."*
*- Sed karulo, kial vi ne vizitis min antaŭe?"*
*- Kio? Ĉu vi vere povas havigi al mi 20 000 .... ?"*
*- Ne, ne, tio kompreneble ne eblas, sed mi konas ege taŭgan rimedon kontraŭ sendormeco!"*

# Kio estas Dialektiko?

Bernard Behra:

Por klarigi per konkreta maniero, la procedon de la dialektiko[2], mi uzas tipe hegelan[3] ŝercon.



Ŝercoj de Slavoj Zizek[1]
Viro eniras kafejon.
- Bonan tagon, kafon sen kremo mi petas!
La kelnero, hegelano, tuj respondas:
- Mi bedaŭras, sed ni ne plu havas kremon, nur lakton... Ĉu vi anstataŭe deziras kafon sen lakto?

Kaj jen dua ŝerco same tiom hegela, kiu ĉi-foje okazas en la situacio en la eks-USSR[4], tie la konsumaĵoj kutime mankis, la foresto de tiuj varoj fariĝis pli kutima ol ilia ĉeesto
Iam do, en Moskvo, viro eniris en vendejon:
- Bonan tagon, ĉu vi havas buteron aŭ ĉu vi ne havas buteron? La vendisto respondis:
- Mi supozas, ke vi eraris, vi estas en vendejo, kiu ne havas elektran kablon, tiu, kiu ne havas buteron, estas vidalvide.

Jen tiel, laŭ tre simpla maniero, la dialektiko en plena agado: tio kio mankas: la negativa; tio kio vi ne estas, estas egale parto de via identeco, vi ankaŭ estas tio, kio vi ne estas.

1. Slavoj Zizek (1949 -): slovena sociologo, filozofo, marksisto, psikanalizisto kaj kulturkritikisto.
2. dialektiko: teorio, prenita ĉe Hegelo kaj uzata de Markso kaj lia skolo, por klasifiki la historiajn faktojn kaj por klarigi la evoluon de la realo, rigardata kiel unuiĝo kaj batalado de kontraŭstarantoj, kaj konstanta transiro de iu difinita ekvilibro, nomata tezo, al rompiĝo de ekvilibro, nomata antitezo, ĝis stariĝas nova ekvilibro, nomata sintezo.
3. Hegelo, Georgo Vilhelmo Frederiko, (1770-1831), germana filozofo, dialektika idealisto, kiu profunde influis Markson; hegelano: disĉiplo de Hegelo, hegela: rilata al Hegelo.
4. USSR: Unio de Sovetaj Socialismaj Respublikoj.

*En la decembra numero de MONATO – monata revuo en Esperanto, kiun vi eble ankoraŭ ne abonas) – aperis letero de legantino, samideanino Renée TRIOLLE. Ŝi skribis jene:*

***Dio, seksumado kaj Esperanto***

*Legante la eseon de Lu Wunsch-Rolshoven pri la misfamigo de Esperanto (Monato 2020/08-09, p. 23-27) mi ekmemoris intervjuon fare de franca ĵurnalistino, kiu prezentis la radio-elsendon por infanoj Les petits bateaux (La boatetoj) ĉe France-inter. Infanoj faras demandojn, respondas fakuloj per simplaj frazoj. Okaze de la 200a elsendo, la gazeto Le Monde demandis, ĉu estas tabuaj temoj. "Jes, tri: dio, seksumado kaj. . . Esperanto. La homoj, kiuj praktikas ĝin, nur laŭdas ĝin; tiuj, kiuj nenion scias pri ĝi, misfamigas ĝin. Renée Triolle, Francio*

Legendo

# La Montori-Kaleŝego.

Traduko de Bernard Behra

*Estas vespero, noktomezo, la severaj mastroj kaj senjoroj de Montori forlasas sian kastelon, por teni konsilion en la urbodomo de Masevaux. Per kaleŝego tirata de senkapaj blankaj ĉevaloj, ili eniras la urbon farante inferan bruon. Ili rapide malsupreniras la monton Schimmel, pasante preter la kapelo Hülsen, tra la strato de la muelejo ĝis la ponto de la viandistoj (Fleischbrücke) trans la rivero Doller, kie staras la malnova urbodomo ("Rathaus"). Ĉar terura estas la alveno de la kaleŝego el Montori, la fenestroj tremas, la pordoj knaras sur siaj ĉarniroj, la traboj kaj plankoj ĝemas ĝis hirtigo de la haŭto, oni kredus, ke la diablo mem eliras el sia infera regno. Kaj kion diri pri la homoj, kiuj akompanas la kaleŝegon de Montori? Ili parolas fremdan lingvon, kiun neniu komprenas. Ĉiu estas singarda eĉ por gvate rigardi tiujn strangajn homojn, ĉar malfeliĉo trafos lin.*

*Brava sinjorino tro scivolema volis vidi la kaleŝegon de Montori tra la fendo de siaj duon-fermitaj ŝutroj. Subite, kvazaŭ per mistera kaj diabla forto, ŝi estis puŝita reen enen de la ĉambro kaj perforte puŝita planken. La ŝoko estis tiel brutala, ke la postan tagon ŝi plendis pri severaj kapdoloroj kaj dum kelke da tempo ŝi ne kuraĝis eliri en la straton. Ŝia kapo kaj vizaĝo terure ŝvelis.*

*Oni ankaŭ rakontas pri malriĉulo, kiu nokte perdiĝis en la arbaro kaj, hazarde, trovis sin sur la vojo de la kaleŝego de Montori. Li estis senkompate renversita. Dum longa tempo oni konsideris lin formortinta ĝis kiam, post multaj monatoj de senfruktaj serĉoj, oni trovos lian korpon sovaĝe mutilita kaj diserigita. .*

*Alvenante al la urbodomo, la senjoroj malsupreniras por teni sian vesperan kunsidon. Pri kio ili parolas? Neniu scias tion. Ĉu eble ili tenas aŭdiencon kaj severe juĝas la grafon de Ferrette, Ulriko la Unua?*

*Servistino de najbara burĝa domo vidis nokte en la salono de la konsilio de la urbodomo helan fajron. Bonege, ŝi pensis, la konsilantoj por unu fojo inteligente faris ion; do mi povas tuj preni fajron por mia forno. Ĉar tro laciĝi kaj labori nocas la sanon. Rapide ŝi prenis ŝovelilon kaj fajrostangon, kuris al la urbodomo, suprengrimpis la grandan ŝtuparon kaj eniris la salonon. Kiom granda estis ŝia hororo, kiam subite kava, kaverna voĉo, kiel eĉ el inferoj, malamike alparolis ŝin: "Feliĉe por vi, virino, ke vi ne venis pro scivolemo, vi estus devinta terure suferi". Oni povas imagi la ŝokon kaj angoron de ĉi tiu malfeliĉulino. Haste, ŝi reiris hejmen, sed tiu-nokte ŝi tute ne plu pensis nek provis kuiri.*

*Ĉirkaŭ la unua, kelkfoje la dua matene, depende de la daŭro de la kunsido, la kaleŝego de Montori forlasas la urbo-domon en terura bruo de feraj rubaĵoj. La freneza rajdo trairas la foiran placon ĝis la korto de la abatejo. Subite silento. La tero malfermiĝas, la kaleŝego kaj la kavaliroj malaperas.*

*La Montori-kaleŝego estis vidita la lastan fojon en 1913. Ĝia apero certe anoncas teruran tempon. La evento okazis en Masevaux. Sinjorino aŭdis strangan bruon en la apuda ĉambro. Kiam fine ŝi decidas malfermi la pordon, glaciigita pro timo, ŝi vidas neniun, sed la fenestro estas malfermita kaj ekstere sur la placo, ŝi aŭdas la bruojn de kaleŝego, kiu foriras. Estis la bruo de kaleŝego kiu foriras. Estis la Montori-kaleŝego.*

*Unu el la unuaj eldonitaj rakontoj de la Montori-Kaleŝego datiĝas de 1876. La aŭtoro asertas, ke li citas tiun legendon kiel ĝi estis rakontita al li en Masevaux de popolanoj. Estas vere, ke multaj homoj en Masevaux, ĉefe de la malnova generacio aŭdis pri Montori-Kaleŝego.*

*Parola tradicio restas, foje kun tre triviala klarigo: antaŭ la unua mondmilito, la afero de ĉi tiu legenda veturilo estus farso starigita ĉiujare de junuloj de la urbo: nokte ili puŝis antaŭ si malnovan ĉaron farante multan bruon, kaj feliĉis prifriponi la civitanojn de la urbo. Ve al la tro scivolemaj virinoj. Tuj kiam ili malfermis siajn ŝutrojn, ili riskis, ke ilia vizaĝo estu ŝmirita per balailo trempita en sterkakvo. Oni murmuras, ke la virinoj, kiuj surstratiĝis, riskis esti forkondukitaj de junuloj vestitaj per longaj manteloj. Pro tio dum la sekva tago iuj havis kapdoloron aŭ eĉ ŝvelintan kapon. Aliaj personoj transsendis al ni la legendon en tuto, aldonante, ke la ĉaro kuradis en la riveron Doller por supreniri ĝin ĝis ties fonto.*

Teksto de René Limacher (legendo) kaj Louis Uhlrich (komento) france aperis en "Patrimoine Doller", n°3, 1993, bulteno de la Historia Societo de la Valo de Masevaux (Alta Alzaco). La originala teksto de Pierre Dieterich germane aperis en "Neuer Elsässer Kalender"(1930).

## *Muŝribelo* Dua premio de Belartaj Konkursoj 2020 de UEA aljuĝita al Ewa Grochowska

La infanoj forlasis brue la tablon kaj pro neeltenebla varmo rapidis al la lago. Post ilia foriro la ĝardeno rekvietiĝis. Aŭdiĝis nur la ronkoj de la avo, kiu siestis en hamako. Marĉjo eliris el sia kaŝejo kaj sidiĝis ĉe la tablo. Iun tagon, la kuzoj devigis lin salti desur alta bordo en la lagon, do de tiam li ne plu ludis kun ili. Li malŝatis la akvon kaj naĝis malbone. Li preferis resti sola kaj observi insektojn.

De kiam li ekmarŝis, Marĉjo ĝoje ridanta, sekvis muŝojn, araneojn, skarabojn. Male, li timegis la katojn kaj hundojn. Eĉ kokinoj kaj kolomboj terurigis lin. Tiu nekomprenebla, stranga sinteno estis tre mistera por ĉiuj familianoj ĝis lia kvara naskiĝtago. Tiun tagon, krom aliaj ludiloj, Marĉjo ricevis skiz-blokon kaj skatolon da kolor-krajonoj. Kaj tuj li ekdesegnis la insektojn kun plej malgrandaj detaloj, normale nevideblaj sen lupeo. Nesciante, kion opinii pri tio, la gepatroj konsultis oftalmologon. Tiu-ĉi deklaris, ke temas pri anomalio nekonata de la scienco. La okuloj de la knabeto pligrandigis la besto-mondon preskaŭ dekoble. Do ĉiu kato estis por li tiel granda kiel tigro kaj meleagro kiel struto. Tiam la familianoj komprenis, kial nur la insektoj ne timigis Marĉjon. Multaj sciencistoj cerbumis pri lia kazo serĉante solvon. Finfine, fama optikisto fabrikis por Marĉjo la specialajn okulvitrojn dank'al kiuj la knabo povis vidi normale. La kontrol-ekzameno farita kelkajn monatojn poste montris, ke lia kapablo ampleksigi la bestojn iom malpliiĝis. La oftalmologo trankviligis la gepatrojn asertante, ke antaŭ plenkresko ilia filo vidos normale.

Nun la okjara Marĉjo ferias ĉe la geavoj. Li daŭre interesiĝas pri la insektoj kaj kiam li vidas ilin proksime, li demetas la okulvitrojn.

Alflugis kelkaj muŝoj. Marĉjo elverŝis la restaĵon de pom-kompoto sur la tablon kaj ne plu moviĝis. La muŝoj alproksimiĝis kaj enprofundigis siajn rostretojn en la deserton. La knabo facile distingis iliajn multfacetajn okulojn, iliajn vilajn kruretojn kaj iliajn abdomenojn. Kliniĝinta super la tablo, Marĉjo tute ne aŭdis la silentajn paŝojn de avinjo. Ŝia muŝ-batileto, subite frapis la tablon. La du muŝaj kadavroj falis surherben.

– Bonege! Du malamikoj malpli. Dank'al vi, Marĉjo. Vi havis bonan ideon proponi al ili la pom-kompoton kiel logaĵon.

Ŝi pretis refrapi sed la knabo kovris per sia mano la brun-flavan muŝeton, kiu promenis surtable.

– Avinjo, kiel vi mortigas muŝojn? Mi multe ŝatas observi ilin manĝantajn. Tio estas tre amuza.

– Marĉjo, ne rakontu stultaĵojn! Ĉiuj malŝatas la muŝojn kaj nenion amuzan oni trovas ĉe ili. Krome, ili transdonas mikrobojn, respondis la avino kaj revenis hejmen. Ankoraŭ longtempe oni aŭdis klakojn de ŝia muŝ-mortigilo.

– Marĉjo levis la manon sed la muŝo ne forflugis. Dankon. Vi savis min. Mi estas la vinagro-muŝo. Mi nomiĝas Drozofila Melanogaster. Drozofila signifas "tiu, kiu ŝatas la roson". Vi povas nomi min Sofila. Mi tute ne komprenas, kial la homoj persekutas nin. La nutraĵoj de nia specio estas ĉefe la putriĝantaj fruktoj. La fermentaĵoj estas delicoj por ni. Pro la nerezistebla bon-odoro de vino, ni ankaŭ flug-turniĝas apud la vin-keloj. Tamen ni ne pikas la homojn.

– Ankaŭ mi ne komprenas tiun malamon. Cetere, estas pli bone, ke vi evitu la muŝ-batilon de mia avino. Se vi volas, morgaŭ post la tagmanĝo, mi alportos al vi iom de mia deserto sed ni renkontiĝu funde de la ĝardeno apud la kabano.

– Konsentite. Mi venos kun miaj gefratoj ĉar ni estas multaj. Mia patrino ellasis 400 ovojn.

– Kun kiu vi parolas, Marĉjo? demandis la avo, vekita de avinaj frapoj. Kial vi formetis viajn okulvitrojn? Vi devas alkutimiĝi al ili. Se ne, vi restos ĉiam sola. Ĉu vi promesas daŭre porti ilin?

– Jes, avĉjo, suspiris Marĉjo ĉar tiuj okulvitroj malebligis lin detale observi la insektojn kaj eĉ distingi Sofilan de aliaj muŝetoj.

Bedaŭrinde, la venontan tagon la avino postulis, ke la avo promenigu la infanojn per boato.

– Ĝuu la mildan veteron kaj tagmanĝu en vilaĝo. Mi restos ĉi-tie por batali kontraŭ la muŝoj, kiuj venenigas nian vivon. Mi aĉetis novan kemiaĵon. Laŭ la najbarinoj, ĝi estas tre efika. Dio mia! Kemiaĵon! Via muŝ-batilo estas jam sufiĉe danĝera armilo, rimarkis la avo.

– Vi malpravas! La muŝoj estas pli rapidaj ol mi. Krome, du mortigitajn anstataŭas kvin aliaj.

Marĉjo foriris trist-miena sed en la tago li forgesis sian rendevuon kun Sofila. Post la vizito al malnova kastelo ili tagmanĝis en kampara gastejo sub arboj. La infanoj plezurigis sin per bona deserto. Marĉjo ĵus enprofundigis la kuleron en glaciaĵon, kiam muŝeto venis sur lian manon.

– Estas mi, Sofila. Mi bezonas vian helpon. Miaj fratinoj vidis multajn kadavrojn de niaj kuzinoj, la hejm-muŝoj, forĵetitajn sur la gazonon. Krome, sufokan odoron oni sentas antaŭ via domo. Ĝi estas tiel forta, ke ni ne povas flugi proksime. Ni eksciis, ke ankaŭ en najbaraj domoj la virinoj estas mortigantaj muŝojn. Faru ion!

– Avĉjo, la ventro tre doloras min. Aj, aj! Mi ege suferas! ekkriis Marĉjo, kurbiĝinte.

Ne sciante, kion fari, la avo decidis reveni hejmen.

Fakte, apud la domo, surherbe, multaj blu- kaj verd-flugilaj muŝoj kuŝis senmove. Dum tri horoj la infanoj ne rajtis eniri la domon pro la danĝera kemiaĵo.

Tiun vesperon Marĉjo ne enlitiĝis. De kiam li aŭdis, ke la avinjo eniris sian ĉambron, li malsupreniris kateske ĝis la kelo malantaŭ la kuirejo. Li kunportis en la fundon de la ĝardeno la botelegojn plenajn de insekticido kaj la du muŝ-frapilojn. Li fosis profundan truon sub la pomarbo kaj enterigis la tuton. Li endormiĝis kontenta, certa pri la efika helpo, kiun li alportis al sia amikino Sofila.

La morgaŭan matenon, malgraŭ la ŝutroj malfermitaj, en la tuta domo mankis la tag-lumo, kvazaŭ oni estus en vintra vespero, ne en la somero. La centoj da muŝoj sidantaj sur la fenestro-vitroj malebligis al la sun-radioj enriri la internon. Kiam la avinjo eliris el la domo la armeo da muŝoj invadis ŝin. Ili enŝoviĝis en ŝiajn okulojn, ŝiajn naz-truojn, ŝiajn orelojn kaj enmiksiĝis en ŝiajn harojn. Ŝi rapide revenis hejmen por forigi la insektojn el sia korpo. Poste, ŝi direktis sin al la kelo por elpreni la kemian armilon kontraŭ la muŝoj, tamen tiu-ĉi mistere malaperis. Ĉiun personon, kiu eliris eksteren, tuj ĉirkaŭis la nigra, zumanta svarmo kaj atakis.

Finfine, la avo surmetis sian abelistan kombineon, ĉapelon kun vualo, gantoj kaj tiel vestita biciklis al la pan-vendejo. Preterpasante najbarajn domojn, li ĉie konstatis la saman, tute nenormalan kvanton da muŝoj sur la muroj kaj sur la fenestroj. Oni malpermesis al la infanoj eliri el la loĝejoj. Tamen Marĉjo deziris revidi Sofilan kaj profitante de la malatento de avinjo, kuris eksteren. Li trankvile trairis la ĝardenon ne ĝenata de la muŝoj. Li renkontiĝis kun Sofila apud la vino-kelo. Sofila sciigis al li, ke la lokaj muŝoj decidis batali kontraŭ la homoj. Ili petis la helpon de aliaj kuzinoj, eĉ la plej malproksimaj.

Pasis tri tagoj. La vilaĝanoj daŭre ne plu povis eliri el siaj domoj pro la muŝ-atakoj. La afero iĝis tiel grava, ke oni parolis pri tio en la televido. La urbestro organizis eksterordinaran asembleon por trovi solvon. Forpeli la muŝojn per la fajro estus danĝere pro la somera sekeco. La insekticidoj mortigus ne nur la muŝojn sed ankaŭ aliajn insektojn, krome oni bezonus translokigi la vilaĝanojn. Neniu proponis ion kontentigan dum la nombro da muŝoj multobliĝis tagon post tago kun miriga rapideco.

Finfine, oni kontaktis la specialistojn pri insektoj. Baldaŭ venis en la invaditan vilaĝon la fama entomologo, profesoro Fabro kun sia skipo por ekzameni tiun fenomenon. Vestitaj kiel astronaŭtoj, ĉiuj sciencistoj akompanataj de laŭta zumado promenis longajn horojn en la vilaĝo. Ili observis la sintenon de la muŝoj kaj ĉi-okaze ili kaptis kelkajn maloftajn speciojn, neniam viditajn en la regiono. Marŝante tra la stratoj Fabro ekvidis la knabon vestitan nur de toĉemizo kaj bermudo, kiu ludis trankvile antaŭ sia domo.

La profesoro venis al li:

– Vi ne timas la muŝojn, ĉu?

– Tute ne, respondis Marĉjo. Mi ŝatas observi ilin. Krome, mi amikiĝis kun Sofila, la vinagra muŝo. Ĝi klarigis al mi, ke la muŝoj ribelis pro la kemiaĵoj uzataj de mia avino kaj de aliaj vilaĝaninoj. Tiu danĝera insekticido mortigis multajn el ili.

– Bonege, ekĝojis Fabro. Dank'al vi, ni povos komuniki kun la muŝoj. Bonvolu demandi, kiam la muŝoj finos sian ribelon? Mi esperas rapidan, kontentigan aranĝon de la situacio por la muŝoj kaj por la homoj.

La muŝoj promesis ĉesigi la batalon kondiĉe ke pac-pakto estu subskribita. Per tiu dokumento la homoj engaĝiĝos unue: ne plu uzi la kemiaĵojn por mortigi ilin, due: organizi prelegojn en la lernejoj por informi la infanojn pri la granda utileco de la muŝoj.

Fakte, la muŝoj ne estas nur transdonantoj de bakterioj kaj la kaŭzo de malsanoj.

Ili estas la ĉefa nutraĵo de la birdoj kaj reptilioj. En malriĉaj landoj la infanoj manĝas muŝ-larvojn, kiuj enhavas multe da proteinoj. En Usono oni importas la "senkapigantajn" muŝojn el Sudameriko por lukti kontraŭ la invado de ruĝaj formikoj. Tiuj muŝoj ovumas en la kapon de la formiko. La disvolviĝanta larvo sekrecias likvaĵon, kiu forigas la kapon de la formiko.

La konata tempo de evoluo de muŝ-larvoj en kadavro, ebligas al la scienc-policistoj difini la horon de la forpaso de mortinto. Kelkfoje la kuracistoj uzas muŝojn en la kazo de malsanuloj, kiujn oni ne povas resanigi per antibiotikoj. La sterilizitaj muŝoj purigas la vundon.

Delonge, la genetiko progresas dank'al esploroj pri la specio Melanogaster. Lastatempe, oni antaŭvidis uzi tiun muŝeton por mezuri la kvanton de pesticidoj en la akvo.

La muŝoj, siaflanke, engaĝiĝis ne plu ellasi siajn fekaĵojn sur la tukojn kaj la homajn vestojn, ne ĝeni homojn dum la manĝado kaj dum la siesto. Ili ankaŭ promesis trejni sin, por ke ilia zumado estu pli mallaŭta.

En la ĉeesto de profesoro Fabro, la avo de Marĉjo, kiu reprezentis la vilaĝanojn, subskribis la pakton kaj Sofila, kiu reprezentis la muŝojn lasis surpapere la spuron de sia krureto trempita en la ruĝa vino. Ĉio revenis en ordon. La vilaĝo iĝis denove agrabla loko. La muŝoj fariĝis pli diskretaj, la homoj denove promenis ekstere. En la kuirejo la avino de Marĉjo de tempo al tempo svingis sian muŝ-frapilon sed tute senefike.

Antaŭ la fino de la ferioj Sofila venis adiaŭi la knabon. Ĉi-okaze Marĉjo formetis siajn okulvitrojn. La ruĝaj okuloj de la muŝeto estis malgajaj.

– Vi ja scias, nia specio vivas nur tri semajnojn do mi venis adiaŭi vin.

– Mi neniam forgesos vin, respondis Marĉjo per tremanta voĉo. Mi desegnis vin kun ĉiuj detaloj kaj mi alkroĉos tiujn desegnaĵojn en mia ĉambro. Adiaŭ, kara Sofila.

§§

La okulistoj ne eraris. De kiam Marĉjo iĝis dudekjara, li vidis la besto-mondon same, kiel ĉiuj homoj kaj li bezonis mikroskopon por observi insektojn. Li studadis etimologion kaj doktoriĝis tre frue en tiu branĉo dank'al eksperimentoj sur la vinagraj muŝoj. Li malkovris, ke laŭ la genetika vidpunkto la homoj kaj la drozofiloj posedas multajn similaĵojn. Li ofte prelegis pri la muŝoj kaj pri siaj eltrovaĵoj kaj instruis la genetikon ĉe la fama universitato.

Iam, venis al lia seminario nova studentino. Ŝiaj haroj estis brun-flavaj. Ŝi nomiĝis Sofila. Sur ŝia kolo videblis la tatuaĵo de malgranda muŝo.

# István Nemere: “Mi estas verkisto, tio estas unika metio”



**Antaŭ 75 jaroj, la 8an de novembro 1944 en Pécs naskiĝis István Nemere, kiu kun siaj 726 hungaraj libroj estas ne nur la plej fekunda aŭtoro en la historio de la hungara literaturo, sed ankaŭ la plej fekunda inter ĉiuj vivantaj aŭtoroj de la mondo. En ombro de ĉi tiu rekordo restas liaj 19 romanoj kaj tri novelaroj (re) verkitaj en Esperanto, sed ĉi tiu nombro sufiĉas, por ke li estu la plej fekunda Esperanto-prozverkisto. Pri la kvalito de liaj Esperantaj verkoj atestas tio, ke kvar el ili ricevis la premion “La Verko de la Jaro”. Malgraŭ sia giganta okupateco li afable konsentis respondi kelkajn niajn demandojn.**

**Kiel esperantistiĝas persono, kiu poste riĉigas la Esperanto-kulturon per pli ol 20 libroj?**

Havante 18 jarojn, en la lasta jaro de gimnazio, mi eksciis, ke Esperanto jam ne estas malpermesita kaj oni organizas kursojn. Mi anoncis min – tiel ĉio komenciĝis.

**Vi estas sendube kaj senkonkurence la plej fekunda Esperanto-aŭtoro. Sed via ekster-Esperanta verkado estas eĉ pli miriga per grandeco: vi verkis aŭ tradukis pli ol 700 librojn en pluraj ĝenroj – romanoj, verkoj historiaj, sciencfikciaj, porinfanaj k. a. Kiel vi atingis tiun rezulton? Ĉu vi verkas de la mateno ĝis la nokto-nokto-fin’?** Ne, mi verkas ĉiutage – sabate, dimanĉe, naskiĝtage kaj eĉ la 1an de januaro – de la 5a matene ĝis posttagmezo. Kaj tiel dum pli ol kvindek jaroj…

**Ĉu verkado de libro en Esperanto iel diferencas de verkado en alia lingvo**

Kompreneble. Ne nur la lingvo estas alia, sed ankaŭ la legantaro. La averaĝa esperantista leganto estas pli pruda ol la nacilingvanoj. Interese, kiam oni tradukas iun mian Esperanto-libron en nacian lingvon, la reagoj estas tre malsamaj. En Ĉinujo, ekzemple, oni neniam tradukas miajn librojn pro iliaj – verdire tre mildaj – seksaj scenoj.



**Se ne kalkuli la ĉi-jaran reeldonon de Jesa, via lasta Esperanto-romano aperis antaŭ dek jaroj. Ĉu vi rezignis pri la verkado en Esperanto?**

Preskaŭ jes. Mi vane atendis, ke oni reagu al miaj lastaj tri romanoj. Nek la legantoj, nek la recenzistoj verkis, nur iomete… Do, ŝajnis al mi, ke jen, alvenis la fino de mia Esperanta verkado. Tamen mi havas iun komencitan romanon, kiun mi volonte finverkus, sed ja mankas instigo.

**La varieco de temoj en viaj romanoj estas tre granda, vi ne estas unutemulo. Sed neniam Esperanto aperas kiel ĉefa, aŭ eĉ nur fona, temo. Ĉu tio rezultas el via konscia decido?**

Kompreneble. Min ne interesas la movado, eĉ ne ĝia pasinteco. Por mi la lingvo estas ilo, kiun mi provas uzi altnivele – mi ne ĉiam sukcesis – kaj por espirmi miajn ideojn, por iumaniere servi la legantojn, la homojn. Jen ĉio.

**Komence de la 1990aj jaroj vi kunfondis kaj poste prezidis la Esperantan PEN-Centron. Bonvolu rakonti, kiel aperis la ideo, kaj kiel ĝi estis poste realigita. Pri kio okupiĝis kaj okupiĝas la verda sekcio de PEN?**

Pri la lasta bonvolu demandi tiujn, kiuj vivigis tiun movadon de verkistoj. Mi hazarde fariĝis ano kaj poste prezidanto. Unu el la ĉefoj de la tiama internacia PEN estis konata hungara verkisto, György Konrád, kaj esperantistoj petis min: parolu kun Konrád, ke li helpu akcepti esperantistajn verkistojn. Tio sukcesis. Sed mi malŝatis esti prezidanto, same kiel mi malŝatis ĉiam esti ie ajn “ĉefo”, gvidanto, ordonanto. Mi estas verkisto, tio estas unika metio, kiun mi konas kaj en kiu mi bone aŭ malpli bone laboras.

**Sed verkado ne estas via sola aktivado por Esperanto. Vi agadis ankaŭ en la kampo de denaskismo. Vi redaktis *Gepatran Bultenon* kaj fine de la 1970aj jaroj vi iniciatis Renkontiĝon de Esperantistaj Familioj, kiu daŭre okazas ĉiujare. Kiu estas la rolo de Esperanto en via familia vivo?**

Nur mia unua edzino estis esperantistino, kaj nia filino fariĝis de-

naska esperantistino. Ŝia filino – do, mia nepino – same estas denaska. Ili vivis-vivas en Pollando, kaj se leteron mi skribas al iu el ili, tion mi plej volonte faras en "nia lingvo", t. e. en Esperanto.

**Kiu estas via plej ŝatata Esperanto-libro?** Tro malmulte mi legis el ili, ja tiom da laboro mi havas ĉirkaŭ miaj hungarlingvaj libroj. Hodiaŭ aperis mia 726a libro hungara (mi kalkulas nur la unuajn eldonojn). Ekde la 723a mi estas la rekordisto en la mondo, ĉar ankoraŭ neniu el la nun vivantaj aŭtoroj verkis tiom. Fakte, ekde kiam hungaroj ekzistas en tiu ĉi mondo, neniu skribis tiom da teksto en la hungara.

**Kaj ĉu vi havas favoraton inter viaj propraj Esperanto-libroj?**

Jes, pleje mi ŝatas *Dum vi estis kun ni* kaj *Terra*.

Intervjuis **Paweł Fischer-Kotowski**

*Ĉi tiu intervjuo aperis, papere en la decembra numero de La Ondo de Esperanto, 2019, №12, kaj rete en La Balta Ondo https://sezonoj.ru/2020/01/nemere*

(Mal)Gaja aktiva semajnfino la 23a - 25a oktobro 2020 en Rottweil

**Kun granda bedaŭro ni hodiaŭ decidis NULIGI la aranĝon.**

La 18an de oktobro alvenis jena mesaĝo de Inge:

## Damna viruso.

Antaŭ kelkaj horoj la BAVELO-estraro kune kun Christoph Frank decidis nuligi por nun la renkontiĝon pro koronaj kondiĉoj (altigo de la infektitoj en tiu regiono kaj la peto de nia Baden-Virtemberga prezidanto, kiu petas la homojn resti hejme, por ke ili ne devu pli striktan regulon enkonduki) kaj ŝovi la renkontiĝon al la venonta jaro. Iĝis pli kaj pli komplike ebligi ĉiujn programerojn, kvankam ni multe laboris pro la higiena koncepto kaj programo. Ni ankoraŭ ne scias kiam aŭ kiamaniere okazigi la renkontiĝon, sed tre verŝajne ne antaŭ septembro 2021.

Mi pardonpetas pro nia decido. Ni longtempe esperas, ke ni povas okazigi la tutan, sed nun ankaŭ pro la sekureco al vi kaj al aliaj geamikoj, sed nun ne plu eblas. Mi esperas, ke vi akceptas nian decidon.

Amike Inge

Ni ege bedaŭras ne povas renkonti vin kaj la aliajn geamikojn.

## Oriĝu

Prave ni vivas en obskura epoko. . .

Esperanto-kongresoj amase nuliĝas, kaj eĉ malgrandaj renkontiĝoj ne povas okazi. Kiel mi tiam ankoraŭ povas gvidi veran Esperantan vivon?

– Unu ebleco estas limiĝi al tio, kion mi sola povas fari de mia hejma skribotablo: legi librojn aŭ artikolojn, verki, traduki (pri tio baldaŭ sekvos plia kontribuo), korespondi. Tio ĉio estas bona kaj valora. Por mi mem kaj por tuta Esperantujo. Sed se mi volas pli, se mi volas vere renkonti aliajn homojn?

– La solvo estas "AMIKUMU" admirinda apo, programeto por via saĝtelefono, por trovi kontaktemajn esperantistojn en mia proksimeco, kiuj ŝatas paroli kaj praktiki mian sopiratan lingvon. Genie.

– Se AMIKUMU ne jam ekzistus, oni devus nepre inventi ĝin – pli ekzakte inventi ĝin ĵus nun en tempoj de koronviruso.

Nun, kvar jarojn post la lanĉo, montriĝis la neceso de pluraj ŝanĝoj kaj plibonigoj por havi daŭripovan produkton. Kaj la teamo de AMIKUMU bezonas vian subtenon. Fariĝu ora membro.

- Oriĝu nun! Kaj invitu viajn amikojn fari same. En la momenta kampanjo vi ricevas grandegan rabaton por la unu-jara ora membreco. Kaj la daŭripovan porvivan or-membrecon vi ricevas kontraŭ nur 149 €. Kaj kiel oriĝi? Eniru vian propran profilon kaj sekvu la oranĝ-koloran kronon (kiel trafe en nia tempo), elektu la deziratan daŭron de via ora membreco. Pagmaniero ne eksplicite menciita estas tiu pere de la UEA-konto amku-r.

Do, ek! Ni revidu nin ore en AMIKUMU

Ĝojas pri tio Ursula Niesert

## Raporto pri la uzado de heredaĵo de Simone Kiry

La celo estis subteni malriĉajn infanojn en projekto de esperantistoj en Goma, DR Kongo.

Societo Bona Volo (SBV) subtenas lernantojn de mezlernejo Rutoboko en Goma, kiuj lernas Esperanton. La subteno estas la kotizo kaj materialo por la lernejo. Alphonse WASEKA estas la organizanto, kaj Penny VOS el Aŭstralio kune organizas la projekton. Antaŭ du jaroj ili instruis kudri kaj nun produktas tekstilajn sakojn kaj buntajn flagetojn.

Simone Kiry donacis 820 Eŭrojn kiel heredaĵon, okaze de la funebro. Andreo kolektis 412 Eŭrojn por la sama celo. Fakte 1326 USD alvenis en Goma la 21-an de februaro 2019. Tiu mono estis lu-donita dum 1,5 jaroj al Etienne KATCHELEUWA KANDOLO por ripari kamionon, kiun li ricevis donace de lia onklo. Li uzis la kamionon por nia projekto pri trinkakvo en Kalima; tial mi sciis, ke li certe povos repagi la sumon; kion li faris dum somero.

Nia unua plano estis subteni projekton de du junaj virinoj, kiuj volis subteni traŭmatizitajn infanojn. Ili tiam estis finstudintaj psikologion kaj sociologion; kaj partoprenis ses-semajnan staĝon en infancentro de SOS-Kinderdorf e. V. (internacia organizaĵo en Vieno; ili helpas al orfoj kiuj ĉe ili vivas en vilaĝetoj de unuopaj “familioj”). Bedaŭrinde poste montriĝis, ke ilia projekto bezonus tro da mono.

Jakvo SALAAM (mi subtenis lian studadon de informadiko) li subtenas SBV per siaj spertoj. Li bezonis monon por defendi sian diplomon kaj la ligitaj kostoj. Li ankaŭ instruas la infanojn en Esperanto. Finfine Alphonse ricevis la reston por pagi lernejajn kotizojn (40 aŭ 50, kaj 80 USD). Do, finfine:

Je la 14a de Aprilo 2020 la virinoj ricevis por prepari la projekton: 150 USD

Je la 17a de Oktobro 2020 Jakvo SALAAM ricevis por la diplom-kostoj: 250 USD

Kotizoj por 17 lernantoj (10 en baza lernejo, 7 en mezlernejo) : 900 USD

La resto de 26 USD estis por la ĝenerala kaso de SBV.

## Raporto de Manfred Westermayer. Ĉi-sube konciza informo de Alphonse







Jakvo kaj 3 gelernantoj de mezlernejo — kun 5 lernantoj — Erick kaj 3 mezlernejanoj







G.S KASONGO
RECU N° : 155/20 20 Classe 8ème
NOM ET POST-NOM : RACHIDI NGOY
MONTANT PAYE : 80 $
MOTIF : Frais scolaire
Sceau et signature

G.S KASONGO
RECU N° : 156/20 20 Classe 1ère
NOM ET POST-NOM : KABUYA KABEYA
MONTANT PAYE : 80 $
MOTIF : Frais scolaire
Sceau et signature


Etienne, pastro Hubert, Alphonse (2017) — Jakvo — Ekzemplo de kvitanco por lerneja kotizo

Finfine, nuntempe Jakvo kaj Erick, du el la junaj beneficuloj de SBV-kaj nunaj kunlaborantoj-vizitis kelkajn privatajn lernejojn kaj pagis la kotizojn. Mi petis al ili fari komunajn fotojn kun la infanoj. Jen*. Ankaŭ kelkajn kvitancojn, mi sendas al vi. * Laŭ nia plano, ni decidis asigni iom da mono al ĉiu infano. Ĉar ĝis nun ni havas nur tri mil dolarojn por ĉiuj dum ni devas pagi almenaŭ 11.000 dolarojn por ĉiuj.

**Amike, WASEKA KAMANGO Alphonse, www.bonvolo.net**

# En arbaro

***La arbaro, vivanta, restas fonto de la vivo mem.***
***Loko por reviviĝi spirite kaj korpe, kaj kiu daŭre vigligas niajn revojn.***
***Tial, ni respektu ĝin!***
***Ni profitu pro ĝiaj bonfaroj, sen ili, ni ne povus ekzisti!***
***La arbaro dankas vin!***





Ni lernu la vortojn en Esperanto







## Aŭtunaj koloraj de novembraj pejzaĝoj



**En Alzaco:**



